106

JULIO / AŬGUSTO 1993

ISSN 0150 5823

Dumonata esprimilo eldonata de **Amika Esperanto-Rondo**
Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE
**Abono en Eŭropo : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF**
**Speciala abono por nepagipovaj landoj : 40 FF**
Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE
Pĉk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

# La rolo de Esperanto en mia vivo

Utilas, de tempo al tempo ekzameni, kian utilon por la homaro onia vivo havas. Plej bone, kaj pli objektive ol oni mem, povas fari tion oniaj kunvivantoj, sed ĝenerale ili faras tion nur ĉe entombigo, aŭ post tio. Kaj krome: ĉu oni iel utilas? Kiu kapablas juĝi, kio estas utila por la homaro? Kaj ĉu la utilo por unu parto ĝia eble estas malutilo por alia parto ĝia? Jen dilemo. Eĉ eblas, ke oni trovas utila nur tion, kion oni mem ŝatas. Jen alia dilemo.

Tamen mi trovas rekomendinde, ekzameni la problemon jen kaj jen, ĉar tiel oni havas ŝancon iomete ŝanĝi sian vivon por fari ĝin iom pli utila, se ne por la homaro, eble por parto aŭ parteto. Kaj verŝajne ankaŭ por si mem.

Mi unue tuj menciu, ke dum mia tuta vivo Esperanto estis nur flankafero. Mia opinio ĉiam estis, ke multe pli gravas por la bonfarto kaj (relativa) feliĉo de la homaro, ke ĝi ektrovu manierojn por vivi en paco, en egaleco, en frateco, en relativa libereco, kaj en plejebla harmonio. Tio estas precipe socia problemo. Kaj mi opinias,

ke siaflanka helpo por akiri interfratecan sociordon estas la plej utila por la homoj. Mi ankaŭ scias, ke ĝi estas ege malfacila helpo. La plej utila kaj necesa, ĉar ĝi estas la precipa tereno, kie pliboniĝo eblas. Ŝanĝi la nin regantajn fortojn de la naturo havas malmultan sukceson. Tiuj apenaŭ ŝanĝeblaj fortoj, el kiuj ekzemple naturkatastrofoj, malsanoj, akcidentoj, kaj niaj personaj pelfortoj, inter kiuj speciale seksa pelo kaj seksa amo, kaj neklarigeblaj diferencoj de gustoj kaj de ŝatoj, jam en si mem kaŭzas al la homaro tiom multe da mizero, ke konvenegas malaperigi la malaperigeblajn multajn mizerojn kaŭzatajn de nia ĝis nun ĝenerale tre malsana kunvivado socia. Tiuj suferoj, kiuj estas maligeblaj per malegoismiĝo de la socio, estas multegaj, kaj mi trovas senigi nin de tiuj plej utile. Preskaŭ same utile mi trovas, helpi tiujn, kiuj nun suferas pro tiu suferiga socio. Mi tamen hontas ne farinti dum mia vivo tiom, kiom mi povis, kaj ne oferinti por la homaro miajn plezurojn kaj vanajn ŝatojn.

Certas, ke la socian boniĝon helpas la disvastiĝo de Esperanto. Universala solidareco pro universala lingvo ne estas neigebla. Eĉ ĝia kreocelo estis, ne simple havi praktikan ilon, sed havi ilon por helpi universalan fratecon. Tamen paca kunvivado dependas ne nur de preskaŭ perfekta lingvo internacia, sed multe pli de sociaj, politikaj, kaj ekonomiaj ŝanĝoj. Forigon de egoismiga materialista sociordo, inter kiaj feŭdismo, ŝtat- kaj privatkapitalismo, militismo, kaj ontaj formoj, estas por mi multe pli grava ol disvastiĝo de Esperanto. Se la socio aliiĝos justa, kvankam sen la ĝenerala akceptiĝo de Esperanto, mi estos kontenta, Se kontraŭe la socio samos aŭ plimalboniĝos, spite de Esperanto, la venko de Esperanto ne multe gravos al mi, kaj preskaŭ ne valoros. Ĉilastkaze Esperanto funkcios nur kiel intelekta ludilo, kio ĝi efektive jam estas por la plejmulto el la elstaraj Geesperantistoj. Do Esperanto sen socia ŝanĝiĝo apenaŭ valoras por mi, kaj socia pliboniĝo sen Esperanto multe valoras por mi.

Tial estas strange, ke el de la jaro 1934 nunen mi uzis tiom da tempo kaj da energio pri Esperanto, pli ol pri politiko. Kaŭzis tion la konsidero, ke la nombro da interesatoj de sociaj problemoj kaj pliboniĝoj estas tre granda, bonŝance, sed ke la nombro da

(daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo)



# " Novfoja vivado implicas plej bonan vivon "

## mia debato

***GBEGLO Koffi :***

*"Se mi povus rekomenci mian ekzistadon, memorante miajn pasintajn spertojn, mi evitus ĉiujn faritajn erarojn. Do, ĉio irus plej bone", asertis patro, konsilante sian filon. Mi kaptis la konsilon kaj rehejmiĝinte, mi pripensadis.*

*Ĉu ankaŭ mi povus eviti tiajn erarojn ?*

*Ĉu la vivcirkonstancoj, en kiuj mi faris la erarojn, estus la samaj, kiel tiuj de la dezirata ekzistado novfoja ?*

*Ĉu mi ne farus erarojn, kiujn mi ne jam faris? Ĉu mia vivo estus vere pli bona ?*

*Mi cerbumadas. Mi bezonas helpon de amikoj esperantistoj, kiuj libere sin esprimas en tiaj cirkonstancoj por malkaŝi sian veran opinion pri ĉio.*

*Diru sincere, ĉu ĉio irus pli bone en la denova vivo !*

**Tereza :**

Unue, ĉu vere, kiam oni rekomencus sian vivon, oni ne refarus erarojn jam faritajn ? La samajn eble ne, sed aliajn, certe jes. Ĉu la cirkonstancoj precize samus ? La vivo estas reto da cirkonstancoj hazarde samtempaj. Se iu el ili forestas, la problemo tute malsamas kaj ĉio iras diverse.

Mi memoras prelegon de porsekureca homo, kiu elmontris al ni kiel akcidento ekestas nur se pluraj faktoj samtempas. Pro kio ne estas tiom da vivakcidentoj ol povus esti. Ili okazas nur se pluraj personoj sammomente ne taŭge agas. Do, kiel imagi, ke en alia vivo samaj cirkonstancoj povus samtempi kiel en la pasinteco? Ankaŭ ni estas iom tio, kion ni travivis. Necesus

ke ĉiuj faktoroj estu ankaŭ la samaj. Laŭ probableco, ne imageble.

Due, ĉu vere mi volus alian vivon ol la mian ? Mi dubas, eĉ opinias la malon. Mi neniam vere cerbumis tiun temon, tamen ĝi ekalfluis al mia kapo kaj mi pensas, ke neniam mi rifuzis mian pasintecon. Eble ĉar mia vivo ne estis tro ĥaosa. Tamen mi tute juna travivis la mondmiliton kaj multe timis la bombadojn en Parizo, la najbarajn atakojn de militistoj germanaj kontraŭ la partizanoj province, ne sekvis pli altajn studojn kiel mi povus fari pli poste, ankaŭ vivis en tute malriĉa familio ; de la 16a jaro mi laboris.

Sed mi opinias, ke mi profitis tiujn cirkonstancojn, ke ili konstruis min tia, kia mi estas. Kiu mi estus, se mi travivus aliajn spertojn ? De pli ol 57 jaroj mi alkutimiĝis al mia personeco kaj mia vivo kaj finfine ne malamas min kaj la vivon mian. Do certe se mi eraris, mi denove same erarus.

***Patriko*** :

*Nia vivo ne estas nia vivo... Ĝi estas la vivo, kies ĉiujn eretojn ni konsistigas je ĉiu momento... Kaj ni havas/ricevis povon modifi la enhavaĵon de la vivo mem. Tio estas, kion ni nomas libereco. Sed libereco ne estas celo per si mem kaj nur rimedo... kaj donaco, kies fonto kaj celo estas amo...*

*Kiam ni parolas pri nia vivo kaj eventuala novfoja nia vivo, ni rezignas pri ĉio tio, elektante fikcion anstataŭ realon...*

*Do ni tute ne bezonas novfojan vivon. Se ni havus ĝin, ĝi probable estus malsama, sed ankaŭ eble pli malbona...*

*Feliĉe estas morto, ĉar se ne tiel, ĉio, kion ni faras, ne havus sencon nek signifon, ĉar oni povus senĉese, eterne rekomenci...*

**GAROLO** : SPERTO NE ESTAS TRANSDONEBLA

Ne malofte, kiam oni maljuniĝas (mi jam estas pli ol 60-jara) kaj observas la agadojn de siaj gefiloj, kiujn oni kompreneble taksas eraraj, oni pensas : kiom bone, se mi ree estus 30jara kaj uzus la tutan sperton, kiun mi nun posedas! Sendube tia pensmaniero estas iel falsa, ĉar en la tempo, en la sinsekvo, en la sociaj kondiĉoj la cirkonstancoj ne povas esti plene la samaj, do la akiritaj spertoj ne nepre povus esti aplikitaj. Kaj evidente, sperto, sentoj pri travivado ne estas transdoneblaj krom en la sugestitaj (sed ne realaj) sentoj de poeziaĵoj kaj romanoj. Ĉiu devas vivi sian vivon. (Ŝajnas ke la ĉi tieaj "ĉenleteranoj" konkordas pri tio.)

La celo de la vivo

En ĉenletero ne eblas klarigi la vivon, nian vivon, ĉar ĉio ĉi tio apartenas al la nekoneblo, neklarigeblo, absurdo. Mi kredas, ke la "forto de la vivo" mem, ekster nia kontrolo estas sufiĉa por gvidi nian vivon ekde la momento kiam ni, kiel raciaj individuoj, kapablas nin eduki, nin instrui kaj tiel disciplini, ordigi, poluri niajn agojn, por ke certa harmonio establiĝu en nia vivofonto kaj kun la kunvivantoj. Mi esprimas sen mistiko la saman ideon kiel Patriko kun lia mistika amo.

Oni diras, ke homo por plenumi sian devon de homo kaj esti feliĉa, devas havi filon, devas planti arbon kaj skribi libron. Nu, mi jam tion faris kaj same kiel Tereza, mi tute ne bedaŭras la iradon de mia vivo. Mi neniam plendis pri decido, kiu eventuale povus esti alia, ĉu pli bona, ĉu pli malbona. Mi ĉiam provis konstrui, neniam detrui, laŭ ĉiuj sencoj de la vortoj, en libera pensado, en libera agado, ĝis kiam sub interveno de la socio, (la nuntempa malevoluo) de la diabla ŝtato, la iniciatado de la individuoj iĝis bremsita, ankaŭ por niaj gefiloj. Tiel eĉ se la sperto estus transdonebla, tio ne eblus.

Je individua konsidero estas malfacile diri kio estas erara en ĝenerala agado krom se oni sin lasas kapti de la famaj "pekoj" : mallaboremo, avideco, uzo de detruaj drogoj ks. Ĝusta estas praktiki solidarecon, erara estas almozi, kaj la memstareco de ĉiu estas la punkto de ekvilibro, aŭ devus esti.

La problemo de idealisto :

Por ni, kunlaborantoj aŭ simplaj legantoj de **Laŭte**, kiuj iel estas idealistoj, do dezirus sekvi tiun idealan vojon, sed estas devigataj "obei" la ekzistantajn sistem-

ojn, aperas efektivaj konfliktoj pri ekzistado nia. Ĉu sekvi nian idealon kaj perei, ĉu obei la fuŝan sociordon kaj eventuale prosperi, sed samtempe perfidi nian idealon, jen la dilemo... Estas malfacile esti ateisto kaj akompani la dikredantojn al preĝejoj pro tradicio, estas malfacile por anarkisto pagi imposton al forigenda monstra ŝtato, estas malfacile akompani funebrantaron kiam oni scias, ke kulto al mortintoj estas senutila primitivaĵo.... estas malfacile sekvi mitojn, kiam nia celo, parte, estas ĝuste forigi tiujn mitojn... tiel, konstante, vole-nevole, ni ĉiun sekundon alterne gvidas nian vivon, jen en unu direkto, jen en alia direkto. Ne estas alia solvo ol sekvi nian propran vojon, eĉ se ĝi estas multdirekta, kaj "denove vivo" estas malreala mistikaĵo.

**Jacqueline Lépeix :**

KIO OKAZINTUS, SE NE OKAZINTUS TIO, KIO OKAZIS ?

Jen la temo de tiu ĉi temo. Ĝi ne estas tre racia, sed ĝi estas universala : mi imagas, ke ĉiu homo iam sin demandis, ĉu lia aŭ ŝia vivo ne povus esti tute alia, ol ĝi efektive estas. "Aĥ, se mi ne farus tiun stultaĵon, nun mi estus pli feliĉa". Mia opinio estas, ke, se mi ne estus farinta la erarojn, kiujn mi faris, mi estus farinta aliajn. Ĉu mia vivo estus pli feliĉa, se mi reagus alimaniere, ol mi efektive reagis al iuj situacioj?

La plej granda katastrofo de mia vivo estis la seksa krimo, kies viktimo mi estis, kiam mi aĝis 13 jarojn : kuzo de mia patrino trudis al mi seksajn tuŝojn. Tiu katastrofo estis la ĉefa motivo de la difektiĝo de mia psiko, kaj de ĉio, kio rezultis el mia psika malnormaleco, inkluzive de miaj tri restadoj en psikiatrejoj.

Ĉu mi faris eraron ? Nu, mi reagis tiel, kiel reagas la grandega plejmulto de la knabinoj, al kiuj okazas simila katastrofo: mi obeis, mi silentis, kaj mi hontis. Estas gravege por mi scii, ke simila katastrofo okazas al multaj knabinoj, kaj ke ili preskaŭ ĉiam reagas same, kiel mi reagis.

Tamen, nuntempe, virinoj aŭdacas paroli pri tio, estas elsendoj pri incesto ĉe la franca televido (ekzemple en la serio "Bas les masques" - ni demetu la maskojn), estas libroj pri seksa mistraktado al infanoj, kaj kebekiaj verkistoj eĉ faris infanlibrojn pri tiu temo, por instrui al la infanoj, ke ili rajtas



disponi pri sia korpo, anstataŭ ĉiam obei la plenkreskulojn. Do, se mi povus refari mian vivon, mi dirus rezolute "ne, mi ne volas" al la kuzo kaj ĉion rakontus al miaj gepatroj.

Do, kio okazintus, se ne okazintus tio, kio okazis ? Ni prenu la ekzemplon de tiuj seksaj tuŝoj, kiujn trudis al mi tiu 65-jara kuzo, kiam mi aĝis nur 13 jarojn. Kia estus mia vivo, se mi estintus kun 13 jaroj kapabla diri "mi ne volas" al plenkreskulo?

Verŝajne mi estus nun edzino kaj patrino. Ĉefa konsekvenco de la perturbo de mia psiko estas, ke mi neniam kapablis krei kun viro harmonian paron, kaj konsekvence ne naskis infanojn. Se mia psiko ne estus ricevinta tiun ŝokon komence de mia adolesko, kredeble tiu nekapablo ne ekzistus, kaj mi trovus kunulon, kaj verŝajne ni farus kune infanojn.

Sed ĉu pro tio mi estus pli feliĉa ? Tio ne certas. Iam, dum deprima krizo, mi skribis al amikino por konfidi al ŝi mian senton de soleco, la malplenecon de mia fraŭlina vivo ktp, ktp. Samtempe tiu amikino skribis al mi por konfidi al mi siajn zorgojn de edzino kaj patrino. Momente ŝi ne plu povis elteni sian edzon kaj siajn du infanojn. Tiu deprima momento forpasis, nun ŝi denove estas feliĉa kun sia amanta edzo kaj iliaj ĉarmaj infanoj. Ankaŭ mia propra deprimo forpasis, nun mi estas feliĉa fraŭlino. Sed la fakto, ke nin kaptis deprimo en la sama momento, tiel ke ni samtempe skribis unu al la alia por plendi pri niaj sortoj, montris al ni ambaŭ, ke en ĉia kondiĉo oni povas sin senti malfeliĉa kaj deziri havi alian vivon. Ĉu mi estus feliĉa edzino kaj patrino ? Tion mi neniam scios. Kompreneble mi farus erarojn en la edukado de miaj infanoj, kiel faras ĉiuj patrinoj. Eble mi naskus kriplan infanon kaj nun pensus "aĥ, se mi estus restinta fraŭlino !" Kiu povas scii ?

Alia konsekvenco estus, ke verŝajne mi nun havus alian profesion. Ŝajnas, ke miaj problemoj pri la rilatoj kun aliaj homoj jam ekzistis antaŭ mia viktiminiĝo : mi estis tre timema infano. Do, eĉ se mia psiko ne estus difektita de tiu katastrofo, mi verŝajne ne povus elekti la instruistan profesion. Sed mi verŝajne estus nun tradukisto, anstataŭ enui en la departementa biblioteko de Malalta Elzaco, kie mia laboro estas tute teda. Kun 20 jaroj mi ricevis diplomon pri germana beletro. Sed tuj poste mi eniris psikiatrejon, kaj nur tri jarojn poste mi refariĝis sufiĉe sana por lerni profesion. Tiam mi ne volis entrepreni longajn studojn, do mi preparis la konkurson de bibliotekoj, ĉar tiu

formado daŭras nur unu jaron. Se mi ne perdus tri jarojn de mia vivo pro miaj psikaj perturboj, mi havus tempon por studi la profesion de tradukisto. Ĉu mi malpli enuus kiel tradukisto, ol mi nun enuas kiel bibliotekisto ? Kiel scii ? Kiam mi entreprenis formadon de bibliotekisto, mi ne antaŭvidis, ke mi enuos pro tiu profesio. Tutcerte ankaŭ la tradukista profesio havas siajn malagrablajn flankojn, kiujn mi ne konas, ĉar ĝi ne estas mia propra profesio.

Ĉu mi ne pensus :"aĥ, kia eraro, ke mi fariĝis tradukisto ! Mi estus pli feliĉa, se mi fariĝus sociala zorgistino." Sed, supoze ke oni akceptus min kiel socialan zorgistinon (se mi havus sanan psikon, ne estus motivo por min rifuzi), ĉu mi estus pli feliĉa, ol kiel bibliotekistino ? Tio ne certas. Se mi havus edzon, du aŭ tri infanojn, kaj estus sociala zorgistino, mi verŝajne plendus, ke mi ne havas eĉ unu minuton por pensi pri mi mem. Mi imagas tiun profesion kiel profesion, en kiu oni certe ne enuas, sed estas troŝarĝita de diversaj zorgoj, kaj riskas deprimon pro la konstato, ke oni ne povas magie ŝanĝi la socion. Ĉu mi ne pensus "aĥ, se mi nur havus la tempon por trankvile sidi en biblioteko !"

Kvankam la psika sufero estis kompreneble io tute pena kaj negativa, la katastrofo, kiu trafis min, ne havis nur negativajn sekvojn, sed ankaŭ pozitivajn. Unu el ili estas, ke mi liberigis min el la influo de la katolika eklezio.

Kiu estas la rilato ? Nu, la ligo de katoliko al lia eklezio neniel estas racia sed dependas de subkonsciaj motivoj. Kiam mi diras al progresemaj katolikoj, ke ilia eklezio estas tiom demokrata, kiom banana respubliko, ili respondas "jes, vi pravas", sed ili restas katolikoj. Kial ? Ĉar la ligo al la katolika eklezio tute ne dependas de intelekta rezonado. Ne pro mia inteligenteco mi eksiĝis el ĝi, sed pro la fakto, ke mia subkonscio ne evoluis same kiel la psiko de katolike edukitaj homoj.

Katoliko estas homo, kiu kredas, ke lia patro estas ĉiopova kaj lia patrino virga. Patraj figuroj estas ambaŭ Dio kaj la papo, patrinaj figuroj estas ambaŭ Maria kaj la katolika eklezio. Mi devis konstati, ke la ĉiela patro, kiu laŭdire estas ĉiopova, faris nenion por eviti, ke mi estu viktimino de seksaj tuŝoj. Do mi ne povas fidi al la providenco. Sekve mi eliminis el mia psiko la bildon de la olda barbulo sidanta sur nuba trono. Kompreneble, intelekte ĉiuj katolikoj scias, ke tiu bildo estas erara, sed mi ne certas, ĉu multaj el ili efektive sukcesas elimini ĝin el sia subkonscio. Kaj se temas pri virgeco, kompreneble mi ne povis havi la saman evoluon tiurilate, kiel aliaj katolike edukitaj virinoj. Verŝajne la fakto, ke neniam mi demandis min, ĉu mi fariĝu monaĥino, havas kiel motivon iun senton, ke mi estas sekse malpura, do malinda dediĉi al Dio virgecon, kiun mi ne plu havas.



Mi ne estas tute konscia pri la influo de mia seksa viktimiĝo al mia religia evoluo, sed mi scias, ke en la deliroj, kiuj kondukis min al psikiatrejoj, miksiĝis la temoj seksaj kaj religiaj. Kaj mi konscias ankaŭ, ke mia rilato al la katolika eklezio ĉiam similis mian rilaton al mia patrino : mia definitiva eksiĝo okazis mallonge, post kiam mi petis laborpostenon 700 kilometrojn for de mia patrino. Ĉar mia patro estis policoficiro, kompreneble psikiatrino provis dirigi al mi, ke mia patro reprezentis por mi la leĝon, la aŭtoritaton, kaj ke mia anarkiemo estas ribelo kontraŭ la patro. Mi obstine rifuzis tiun interpreton : la aŭtoritato estis mia patrino ; de ŝi, ne de mia patro, mi ricevis ordonojn kaj vangofrapojn. Cetere, de 1965 ĝis sia morto en 1981 mia patro suferis pro la malsano de Parkinson, do mi havis pri li la bildon de malsana viro, ne la bildon de familiestro. Estas ja fakto, ke en la du ĉefaj tendencoj de la neperforta medio, la kristana kaj la anarkia, multaj aktivantoj estas gefiloj de policistoj aŭ armeanoj, sed en mia propra vivo la aŭtoritato estis mia patrino, kaj miaj rilatoj al mia patrino similis miajn rilatojn al la katolika eklezio.

Mi estis programita por resti virga ĝis mia edziniĝo al katoliko, kaj por poste naski infanojn (ne tro : ĉiuj miaj katolikaj amikinoj prenas la pilolon). Se mi ne deflankiĝus de tiu normo, mi estus nun tute normala franco, kiel estas, ekzemple, Suzanne Calas, Gilbert Ledon aŭ Yves Peyraut. Mi kredus, ke ekzistas nur du sintenoj pri religio : la katolika kaj la malkatolika.

Sed, sen mia volo, mia trajno elreliĝis. Ĉar mi retroviĝis ekster la reloj, mi devis iri per miaj propraj piedoj. Mi longe piediris sole, ĝis mi trovis promenkunulojn : la kvakerojn. Nun ni piediras kune ekster la tro uzataj vojoj.

Do se oni konsideras memstaran penson kiel ion pozitivan, oni devas konkludi, ke la katastrofo, kies viktimino mi estis, havis pozitivan konsekvencon.

Verŝajne, se mi havus edzon, infanojn kaj interesan laboron, mi ne havus tempon por aktivi por Esperanto kaj por Amnestio Internacia. Ĉar mi ne havas sentimentan vivon, kaj ankaŭ ne estas kontenta pro mia laboro, mi por konservi mian psikan ekvilibron bezonas eksterajn aktivadojn, kiaj estas Esperanto, Amnestio Internacia kaj similaj aktivadoj. Do tiuj, kiuj ŝatas miajn tekstojn, kaj aprobas, ke mi aktivas por homaj rajtoj, devas konkludi, ke havis ankaŭ pozitivajn konsekvencojn la krimo, kies viktimino mi estis.

Tio certe ne estas motivo, por ke la viroj, kiuj legas min, tuj perfortu la filinetojn de siaj kuzinoj ! Ĉi-vespere mi skribos al serba armeestro, ke li ĉesu perforti bosniajn knabinojn. Komprenebla krimo estas krimo. Mi volas nur konkludi, ke eĉ katastrofo povas konduki al pozitivaj sekvoj, kaj ke oni neniam povas scii, kia oni estus, se oni ne estus tia, kia oni estas. Universala estas la emo meti tian demandon, sed ne ekzistas la racia respondo.

**Edmundo :**

*Mia ĝisnuna vivo neniel estas sukcesplena (Mi estas jam 26-jara kaj apenaŭ komencis miajn doktoriĝajn studojn, pri kiuj mi ne progresas tre bone), sed mi memoras neniun grandan sortobaton kaj neniun gravan eraron miaflanke. Tamen mi devas konfesi, ke mi ne multe serĉis tiajn aferojn en mia pasinteco. Mi emas forgesi ĉion, kio estas pasinta kaj ne havas klaran utilon por la estonteco. Eble mi ne vere forgesas pasintajn aferojn, sed certe mi malofte pensas pri ili. Se mi multe pensus, verŝajne mi povus memori multajn aferojn el miaj lernejaj jaroj, eble eĉ la nomojn de miaj samklasanoj, sed mi ĉesis pensi pri ili tuj, kiam mi forlasis la lernejon. Eble mi povus plibonigi mian vivon, studante mian pasintecon por trovi la erarojn, kiujn mi eble faradas kaj refaradas senkonscie. Tamen mi dubas pri tio. Mi pensas, ke mia revema kaj mallaborema karaktero kulpas pri la fuŝaĵoj de mia vivo, kaj tiujn aferojn mi ne volas ŝanĝi, tio estas, mi ne sufiĉe deziras la ŝanĝon por kapabli efektivigi ĝin.*



*Ĉiu momento en ĉies vivo estas turnopunkto en la senco, ke la estonteco de ĉio radikale dependas de ĉiu detalo. Foje oni konscias pri tiuj turnopunktoj, kiam hazardo ŝanĝas la kurson de onia vivo. Tia punkto en mia vivo estis je 15:00 je 1989-04-20. Tiam mi enbusiĝis en Frankfurto en aŭtobuson al Londono. En la sama aŭtobuso estis Marianne, kiu malgraŭ sia malsaneco veturis al Londono por ĉeesti koncerton. Nun ni loĝas kune en Kembriĝo, kien mi revenis post trijara restado en Germanujo, dum kiu mi veturadis preskaŭ ĉiusemajne inter Sarbrukeno kaj Frajburgo, la loĝurbo de Marianne. Flugfolio pri la koncerto pendas sur la muro super nia lito, por ke mi povu kontroli pri la dato de tiu busvojaĝo. Se mi ne estus renkontinta ŝin tiun tagon survoje inter Frankfurto kaj Londono, kie mi nun estus ? Mi ne povas scii, sed verŝajne mia vivo estus tute alia.*

**Suzanne :**

Ĉu eblas regi sian estontan vivon en la socio ?! Unue, oni naskiĝas, hazarde, en medio, kiun oni ne elektis kaj ofte oni ne elektus..., kies influo gvidas nin ekde la eniro en la vivon. Tiu influo daŭras plejofte ĝis la fino de la adoleskanteco. Tio koncernas precipe la antaŭajn generaciojn - ĝis la lasta mondmilito. Nun la gejunuloj liberiĝas de la gepatra potenco : ili elektas sian estontan metion, profesion, ofte ekde la dekokajaraĝo. Ili konkubece vivas. Mi mencias tion, ĉar ankoraŭ en la jaro 1930 iujn gefilojn la gepatroj edzigis, eĉ kiam la gefiloj jam profesie laboris.

Mi konstatis (as) sinsekvojn da eventoj ; tiam la irado de la vivo ŝanĝiĝis foje tiel, ke, se mi legus ilin en romano, mi opinius, ke la verkisto troigis. Tamen mi konstatis tion en mia familio. Foje la evento estis malfavora, malgajiga, grava malbono, sed poste ĝi fariĝis bona... Tio okazis al mia patro - profesie - kaj al mi koncerne mian eksedziniĝon.

Nun, okdekunujara, mi pripensadas mian vivon... Mi dezirus ĝin al ĉiuj mizeruloj, malfeliĉuloj. Tio ne signifas, ke regis ĝojega etoso, ke ne okazis ĉagrenoj, seniluzi-

igoj, sed plejofte serene mi vivis. La junulino, kiu mi estis, trovis ĝin monotona vivo. Tamen mia interesiĝo pri la socia demando mildigis ties monotonecon. Antaŭ kvardek du jaroj Esperanto eniris en mian vivon - sinsekva evento. De tiam mia vivo riĉiĝis, kvankam tiam mi nur korespondadis.

La lasta vivperiodo estas iomete maltrankviliga koncerne la rimedon kian elektos la "Falĉistino". De antaŭ dek ses jaroj mi vivas en soleco. Dank'al mia idealo - progresigi la homaron al Frateco kaj Justeco - kaj al mia E-familio mi stoike eltenas mian solecon.

***Nicole Déjean* :**

*Kiam mi legas la demandon de GBEGLO Koffi, venas al mi tuja reago diri : kial maltrankviliĝi, zorgi pri denova vivo tute ne certa kiam plej grave, laŭ mi, estas kiel eble plej bone plenumi sian nuntempan vivon, tute realan ?*

*Mi elektos la duan sintenon, ĉar nenio permesas al mi kredi je "reenkarniĝo", kvankam mi ŝatus tion ebla...*

*Kiel en filmo, oni povas imagi sin kaj ĉiujn siajn proksimulojn, konatojn kiel konstantajn aktorojn kun konstanta identeco de scenaro, kiu disvolviĝos diversmaniere laŭ la reagoj de la aktoroj. Mi vidis tiajn filmojn por pritrakti psikologiajn kaj sociajn problemojn. Estis al mi tre interese. Sed ĉiam estis supozoj, ne realeco ; la vivo ŝajnas (feliĉe) multe pli malsimpla, multe pli neatendebla. Ĉar, ĉu evitante jam faritajn erarojn ni ĝuste antaŭvidos la reagojn de la medio ? Ĉu la aliaj reagus laŭ nia atendo? Laŭ mi, ne devige. Novajn erarojn, novajn miskomprenojn, novajn spertojn, feliĉajn aŭ ne, ni travivus. Estus alia vivo, nur eble pli bonŝanca, pli interesa. Krome, mi aldonas : Kio estas bona vivo ? ĉu la homo ne estas eterna postulanto ? Ĉu foje eraroj ne instigas evoluon propran ? Ĉu la homo regas sian tutan vivon ? mastras la cirkonstancojn ? la eventojn ?... Ĉiu el ni havas sian respondon...*



*Kial deziri koni la estontecon ? Ĉu tio ne malhelpos al ni ? Ĉu la nunaj problemoj ne sufiĉas ? Kial ne zorgi aŭ ĝui la tujajn momentojn ? Spertoj (pasintaj) devus unue helpi al pli bona pluvivo, doni al ni "saĝecon", malfermi nian menson, nian spiriton, disvolvi nian juĝkapablon, nian spriton... Sed necesas propra decidiĝo por pozitive uzi niajn spertojn, necesas ankaŭ klarvido por ĝuste analizi, honesteco por akcepti siajn erarojn, siajn mankojn.*

*Fine mi pensas, ke la aserto de la patro havas signifon proksiman de la proverbo "Homo informita (klerigita) egalvaloras du homojn." Do mi diras responde al Gbeglo Koffi : Multobligu viajn spertojn, viajn sciojn por jam nun pli bone vivi !*

**J.G. :**

Kiam oni intervjuas verkistojn, aktorojn, sciencistojn kaj aliajn "eminentulojn", oni metas ofte al ili la demandon : se vi povus rekomenci vian vivon, ĉu vi farus la samajn elektojn, sekvus la saman vojon ? Praktike ĉiam ili respondas : "Jes! Mia vivo plenumis miajn dezirojn, mi bedaŭras nenion!" Se oni metus la saman demandon al personoj, kiuj dum la vivo renkontis ĉefe malsukcesojn, fiaskojn, sendube la respondoj estus malsamaj ol tiuj de la favoritaj eminentuloj.

Laŭ mi, la intereso de tiuj demandoj estas, ke ili devigas iom fari la bilancon de la pasinta vivo, sed ĉu estas eble fari ĝin objektive ? Tiu, kiu havas pesimisman tendencon, vidas nur la malsukcesojn kaj senĉese bedaŭras ion aŭ iun. La optimisto memoras nur la bonajn momentojn kaj ne volas vidi la erarojn, la fiaksojn.

Krome, kia parto de libereco ekzistas ĉe niaj elektoj? Kian rolon ludas la cirkonstancoj, la epokoj ktp ? La mondo ŝanĝiĝas tre rapide kaj la travivitaj spertoj povas preskaŭ neniam helpi por solvi la nunajn problemojn. Oni vidas tion rilate al la generacioj : ĉiu havas sian vivmanieron, volas fari siajn proprajn spertojn kun sukcesoj kaj malsukcesoj, sed mi konsentas ankaŭ, ke klerigo, malfermo de la menso estas utilaj iloj por la konduto en la vivo.

**Vilhelmo : Domaĝe pri la juneco en la manoj de...**

*Post trarigardo de la tekstoj Nikola kaj Ĵaka (kiujn mi ĝenerale konsentas) - mi simple daŭrigu :*

*Parolas ne iu ajn, sed ja patro al filo, kaj ne iel, sed konsilante. Kie do kaŝiĝas la konsilo, se ne en la patra pedagogeco, ke la filo utiligu por sia propra vivo la spertojn de jam farita vivoĝojo, nome la spertojn patrajn ? Tiel generacio al generacio efektive transdonas siajn vivospertojn, tiel estiĝas kohero intergeneracia : la tuta edukado estas nenio alia ol tio.*

*Sed kial la patro tiam ne simple diras : "Aŭskultu, filo! Male al juna vi, mi estas vivosperta homo kapabla evitigi al vi ĉiujn erarojn de mi faritajn. Vi bezonas por tio nur simple sekvi miajn konsilojn" ?*

*Ĉar la patro konscias, ke mankas al la junulo ĝuste la propra sperto por plene aprezi la patran (aŭ instruistan aŭ aliulan). La arto pedagogia konsistas ja en la lerteco, sisteme okazigi al la junulo proprajn spertojn, ofte anstataŭigante ilin per pedagogiaj trukoj, tiel ŝajnigante ilin. Kaj tamen - kia malsameco inter spertoj "propraj", do faritaj memsinstige survoje de la propra vivo, kaj tiuj artefaritaj en lernejo !*

*Per tia temo veninta el la eble ankoraŭ (por Eŭropanoj) enigme kaj mite nigra kontinento, ni troviĝas tuj meze de la kontraŭdiroj. Iu alia - eble mi legis tion ĉe fame konata irlanda dramisto - esprimis tiun malecon jene : "Domaĝe pri la juneco en la manoj de tiuj junuloj!" (alivorte : La juneco estas multe tro valora por tiuj junuloj).*

*Do, tiuj "junuloj" havas ĉion belan, ekan, freŝan, printempan en si - sed ne scias ĝin aprezi, uzi, valorigi. Oni scias tion fari nur jam perdinte la junecon.*

*Tiu Afrika konsilo sternas la "generacian kontraŭdiron" laŭ la sama ebeno : unu post la alia, tamen la sama, do kombinante ambaŭ avantaĝojn (sperta identeco kaj juneco) kaj forigante ambaŭ malavantaĝojn (sensperteco kaj maljuneco). Eble konvinka propono por junulo : Pripensu la valoron de spertoj kaj provu akiri ne nur proprajn, sed ankaŭ aliies vivospertojn. Vi tiel duobligos vian vivon kvankam restante junaj.*



**Ĵanseb : ĈU VIVO ANTAŬ LA MORTO ?**

Mi ne kredas je reenkarniĝo, nek je la malo. Mi scias nur ke, se oni rajtas novan vivon, plej verŝajne oni ne memoros pri la nuna. Kial zorgi pri ebla estonta nekonata Mi-mem pli ol pri realaj nunaj Aliuloj, kiujn mi ja konas, sed ankaŭ povas helpi ?

Sperto estas senvalora, kiam temas pri malsukcesoj. Sukcesintoj povas instrui al la gejunuloj kiel li faris, kondiĉe ke ili havu la samajn celojn kaj ke la ĉirkaŭaĵo ne tro multe ŝanĝiĝis. Malsukcesinto plejofte deziras nur sin pravigi, pruvi, ke mankis al li nur unu afero por sukcesi - bonŝanco aŭ malpli da bonkoro aŭ alio - kaj demonstri kiel li sukcesus en aliaj cirkonstancoj. Plejofte, gejunuloj ne alte taksas tian sperton...

Kial bezoni alian vivon ? Eĉ tiu, kiu ĉion fiaskigis, ricevas ĉiutage novan vivendan tagon. Sed la plejparto de la homoj profitas de tiu ĉi por pli saĝe aŭ pli agrable vivi ĝin ol la antaŭan... Kial oni pli inteligente agus per nova vivo ? Mi memoras iun homon, kiu gluis sur la muro de sia kuirĉambro, fronte al la loko, kie li matenmanĝis, afiŝeton kun tiu frazo :

FESTU TIUN ĈI TAGON, ĈAR ĜI ESTAS LA UNUA DE VIA ESTONTECO !






***SUBARBARA KVIETIĜO***

*Sub arboj dujarcentaj paŝado mia lantas.*
*Subite fruaŭtunis varmega post somero.*
*Malĝoja birdokanto l' orelon triste hantas.*
*- Ravel piansonigis ĉi kanton sen espero.*

*Subite fruaŭtunis varmega post somero.*
*Ĉu birdoj antaŭsentas dampiĝon de vivpleno ?*
*Ravel piansonigis ĉi kanton sen espero.*
*Pli lantas miaj paŝoj : ĉu morto, aŭ nur sveno ?*

*Silvio antaŭkantas dampigon de vivpleno,*
*Orvosto de fazano flamfulme sin traŝovas.*
*Pli lantas miaj paŝoj : ĉu morto, aŭ nur sveno ?*
*Lastfoje kapreolo l' amorvokadon provas.*

*Orvosto de fazano flamfulme sin traŝovas ;*
*Surbrodas sunmakulojn folioj de tremolo.*
*Lastfoje kapreolo l' amorvokadon provas...*
*Flavaĵojn disdancigas kaprica ventovolo.*

*Surbrodas sunmakulojn folioj de tremolo,*
*Al oro, bruno, rusto lumverdo lokon cedas.*
*Flavaĵojn disdancigas kaprica ventovolo*
*- Volupta voĉ' de vento, dum urba bruo tedas !*

*Al oro, bruno, rusto lumverdo lokon cedas.*
*Ĉi arboj dujarcentaj disverŝas mildan pacon.*
*Volupta voĉ' de vento, dum urba bruo tedas,*
*Ho vi, dolorforiga, forblovu mian lacon !*

*Ĉi arboj dujarcentaj disverŝas mildan pacon.*
*Ĉagrenoj, eĉ korvundoj stompiĝas, ŝajne vantas.*
*Dolorforiga vento, forblovu mian lacon...*
*Sub arboj pacodonaj paŝado mia lantas.*

***Suzanne BONIOL***



GENIA POETO

Czeslaw MILOSZ naskiĝis la 30-an de junio de 1911 en litova vilaĝo Szetejnis. Dum jurstudoj li kunkreis literaturan grupon. En 1933 li eldonis sian unuan poezian volumeton sub la titolo **"Poemo pri la tute malvarmiĝa tempo"** kaj en 1936 **"La tri vintroj"**.

En la ajroj 1934-35 li studis en Parizo. Poste, en 1936 li komencis labori en Pola Radio en Vilniuso kaj ekde 1937 en Varsovio. En 1945 li laboris kiel kulturkonsilanto de la polaj postenoj en Usono. En 1960 li estis invitita je prelegoj en la Berkeleja Universitato. Tien li transloĝiĝis kaj laboris kiel profesoro de literaturo kaj slavaj lingvoj. En 1980 li ricevis Nobelpremion.

En tre mallongigita formo tiel aspektas la biografio de tiu genia poeto. En tiu ĉi artikolo mi volus prezenti la superecon de lia poezio kaj provi montri liajn sentojn.

Czeslaw Milosz en mia opinio estas unu el la plej grandaj mondaj poetoj. Li verkas ne nur en pola lingvo, sed ankaŭ en la angla. Liaj poemoj enhavas tre profundan filozofion. Tre dolore li travivis la hitleran okupacion kaj tion oni povas trovi en multaj liaj versaĵoj. En lia tuta kreanteco disvolviĝas universaleco metafizika kaj religia. Tre bona ekzemplo estas **"La Tera Hurlo"**, kie la poeto serĉas homiĝan Dion. Tre ofte Milosz revenas al historio kaj per tio volas montri la terurecon de la dua mondmilito. Samtempe li zorgas pri beleco de liaj poemoj, beleco de la lingvo (**"Kanto pri porcelano"**). Malgraŭ, ke iafoje ĉiu verso de poemo estas diferenca, kreiĝas unueco.

Multfoje en siaj poemoj Milosz revenas al la patruja tero. Liaj versaĵoj estas ĉiam legintaj. Dank'al ili oni povas ekkoni la sentojn de elmigranto kaj lian sopiron al la patrujo. Ĝuste lia elmigrado kaŭzis, ke li verkadis novajn, ankoraŭ pli valorajn poemojn.

Oni devas aldoni, ke Milosz verkas ankaŭ prozon. Unu el liaj plej gravaj verkaĵoj estas **"Subjugita menso"**. Mi volus rekomendi ankaŭ **"La jaro de ĉasisto"** - lian taglibron en la jaroj 1987-88.

Kiel mi antaŭe menciis, Czeslaw Milosz estas genia homo. Li estas tre bonkora kaj, kio estas tre grava, li

zorgas pri siaj legantoj, kion mi mem spertis. En decembro 1992 mi skribis leteron al C. Milosz por esprimi mian simpation al liaj verkaĵoj. Mi ne pensis, ke li respondos, aŭ ke, se li respondos, certe ne tiel rapide. Jam en februaro mi ricevis tre agrablan leteron de Czeslaw Milosz. Ne estis atingeblaj liaj plej novaj libroj en mia loĝloko. Li permesis skribi en mia nomo al eldonejo de liaj libroj. Jam post monato mi ricevis liajn plej novajn verkaĵojn. Mi pensas, ke tio substrekas lian bonkorecon.

Per tiu ĉi artikolo mi volus ankaŭ tre elkore danki al Czelaw Milosz pri lia verkado kaj pro tio, ke dank'al ĝi mi sentas min pli valora.

**Remigiusz GRZELA**, PL.

************************************************************

FAKULTATO PRI MEDICINO
DE TULUZO (Francio)

Nia amiko Barthélémy BALLESTER projektas prezenti, en la kadro de la Internacia Atesto (pri lernado) de Homa Ekologio, universitatan memuaron pri la temo :

LINGVA KOMUNIKADO :
ĈU UNIVERSALA SKRIBO AU UNIVERSALA LINGVO ?

Ĉu vi povas sendi al li viajn vidpunktojn pri tiu ĉi temo, viajn ideojn kaj argumentojn, kaj ĉiujn dokumentojn aŭ bibliografiojn, povontajn helpi lin en tiu ĉi studado, ĉu en nacia lingvo, ĉu en esperanto ?

Nia amiko sendos al vi ekzempleron de la memuaro defrancigita, kiun li prezentos.

Dankon ! Amike via :

Skribu al : Barthélémy BALLESTER, CIDEX 3050
Place de la Mairie, F - 31700 DAUX

************************************************************

*En la mezo de tiu ĉi numero vi trovos donace **"Naciecaj Problemoj"** - du tekstojn de Roza Luksemburg.*
*Malnovaj broŝurabonantoj siatempe jam ricevis tiun ĉi broŝuron. Sed la nova eldono enhavas la finon de la unua parto, kiu mankis en la eldono de 1975.*

*Kribo.*

# ĈIES VOĈO



## "LA ISRAELA AGRESEMO" - ĈU REALO AŬ MITO ?

Israelo festis ĉi-jare la datrevenon de sia sendependiĝo, sub la regado de maldekstrula koalicio, eble la plej "kolombeca", kiun ĝi iam posedis. Tiu revenis al potenco post 15-jara hegemonio de la dekstrularo. En aprilo 1993 renoviĝis kun nova elano la pac-intertraktadoj kun Jordanio, Sirio, Libano kaj la palestinanoj. La araba flanko postulas kiel antaŭkondiĉon por paca solvo - redonon de la teritorioj okupitaj en 1967 (la "sestaga milito") : Judeo-Samario, Gaza strio kaj altebenaĵo Golan.

Cele al refuto de tendencaj kaj falsaj asertoj, ne estos senutile mallonge skizi por neinicitaj legantoj la historiajn eventojn, kiuj kondukis al la okupado de la nomitaj "teritorioj" plus la duoninsulo Sinaj (intertempe redonita al Egiptujo). Parolu por si la faktoj !

Post la kolapso de la Otomana imperio, Britio ekposedis, komisiite de la Ligo de Nacioj, la mandaton super Palestino, kun la solene deklarita celo establi en ties kadro nacian hejmon por la juda popolo. Inter la du mondmilitoj enmigris kelkaj centmiloj da judoj, ĉefe el Eŭropo, parte pro pionira idealismo, parte pro rasisma diskriminacio kaj persekutoj. En la jaroj 1920, 1929 kaj 1936 eksplodis grandskalaj perturboj fare de la araboj. Ĉenoj da murdagoj estis organizitaj de la Supera Araba Komitato, fronte kun la jerusalema muftio Amin El-Hussejni - poste militkrimulo : konsildonanto de la nazia diktatoro en Berlino pri la fifama "fina solvo de la juda problemo", kaj varbanto de islamanoj en Bosnio por aliĝo al la taĉmentoj de SS.

La nazia murdist-reĝimo amasbuĉis trionon de la tuta juda popolo. La libera mondo, inkluzive la kristanajn ekleziojn, faris tre malmulton por haltigi la monstran genocidon. Eble ioma konscienc-riproĉo gvidis la plimulton de la ŝtat-membroj de la Unuiĝinta Naciaro decidi pri la fondo de juda ŝtato sur parto de Palestino,

kaj paralele kun ĝi - de araba ŝtato sur la restinta parto. Tio okazis en Lake Success, apud Novjorko, la 29-an de novembro 1947. La juda flanko akceptis kun jubila ĝojo la verdikton pri renovigo de juda sendependeco post ties ĉesigo en la jaro 70 p.K., fare de la romiaj legioj de Titus ; male, la araba flanko lanĉis tuj teror-atakojn organizitajn kaj efektivigitajn pere de armitaj arabaj bandoj, kun la celo "forviŝi per sango tion, kio skribiĝis per inko". Post duona jaro da sovaĝaj atakoj, en la tago mem de la finiĝo de la brita mandato (15-an de majo 1948), reage al proklamo de sendependa Israelo, sekvis invado de ses regulaj armeoj el la najbarlandoj, por helpi al siaj palestinaj fratoj sufoki la ĵus akiritan liberecon, kaj verŝajne daŭrigi la en 1945 ĉesigitan genocidon.

Kiel sciate, la multoble pli forta invad-armeo estis repuŝita de la israelaj fortoj, je prezo de ses mil viktimoj, soldatoj kaj civiluloj (la tuta loĝantaro nombris apenaŭ 600 milojn). En 1949 armisticaj konsentoj kun la kvar najbarlandoj fiksis iom pli sekurajn landlimojn el vidpunkto de Israelo, sed tio estis nur relativa : meze de Israelo, apud Natania, la jordania landlimo distancis nur 16 km. de la Mediteranea bordo !

Spite al tiamaj esperoj, la armisticoj ne kondukis al paco. La arabaj landoj proklamis bojkoton, trejnis teroristojn kaj forĝis venĝon pro sia malvenko. Sekve de gravaj provokoj eksplodis novaj militoj en 1956 kaj 1967. En tiu lasta falis en la manojn de Israelo la menciitaj teritorioj. La registaro deklaris, ke ĝi pretas redoni la teritoriojn kontraŭ ĉesigo de malam-propagando kaj bojkoto, samtempe alvokante la arabajn ŝtatojn establi pacajn rilatojn bazitajn sur interkonsentita pac-traktato, kiuj enhavus plenan garantion por nia estonta sekureco. Reage al tiu ĉi alvoko sekvis la kontraŭ-deklaro de la landoj de la Araba Ligo en ĝia kunveno en Khartum : "Nek intertraktadoj, nek paco, nek agnosko!" En tiaj cirkonstancoj la "teritorioj" restis sub administrado de Israelo, kiel garantio kontraŭ nova militiro flanke de la araboj.

La atako venis kun neatendita subiteco : en la plej sankta festo-tago, "Jom-Kipur", Sirio kaj Egiptujo lanĉis masivan atakon en Sinaj kaj Golan. Malgraŭ la malfavoraj komencaj donitaĵoj, ene de 3-4 tagoj la Defend-armeo transirinte al kontraŭatako troviĝis okcidente de la Suez-kanalo, kaj en danĝera proksimeco al Damasko. Nur la energia interveno de Usono savis la egiptan armeon de katastrofa malvenko. Tiam Sadat, pripensinte la okazintaĵojn, venis al la konkludo, ke la israela armeo estas nevenkebla, aliflanke la egiptoj forviŝis la hontmakulon de la "perdita gloro" en '67, sukcesinte trapasi la Suez-kanalon, trarompante la israelajn defendliniojn. En tiaj cirkonstancoj, post la drameca vizito de Sadat en Jerusalemo en 1977, Egiptio ricevis la tutan teritorion de Sinaj, sed la Gaza-strion ĝi rifuzis reakcepti, asertante, ke ĝi apartenas al Palestino. Cetere Sadat pagis per sia vivo por tiu kuraĝa paŝo, same kiel reĝo Abdallah, la avo de la nuna jordania reĝo, kaj aliaj kompromisemaj kaj moderaj arabaj politikistoj.



La modelo de paca kunvivado inter Israelo kaj Egiptujo maturigis en la mensoj de la ceteraj najbarlandaj politikistoj la ideon revizii la obstinan trioblan NE-adon de Khartum, kaj kontakti, kaj sub usona perado provi atingi solvon al la longdaŭra kaj amara Mezorienta konflikto. Ankaŭ la palestinanoj, viktimoj de siaj senprudentaj, nefleksеblaj gvidantoj, aliĝis al la pac-intertraktadoj. Amaso da suferoj, perdoj, nemezurebla tragedio povus esti evititaj, se la palestinanoj estus akceptintaj en 1947 la rezolucion de UNO. Ni esperu, ke nun ili ne preterlasos la oportunon interkonsenti kun nia sincere pacema registaro, ĉar paca solvo servos finfine por la bono kaj prospero de ĉiuj interesataj flankoj.

Post la kolapso de la sovetia bloko kaj malfortiĝo de la ĉantaĝ-povo fare de la ole-posedantaj landoj, la cetera mondo pli kaj pli komprenas, ke la onidiroj pri israela agresemo apartenas al la rustiĝinta arsenalo de antisemitoj kaj malamikoj de paco.

**Teddy Löwenkopf**

**Letero el Pollando :**

"Mi deziras konfirmi la opinion de mia samlandano Remigiusz Grzela ke fakte la naskiĝlando de E-o estas Pollando. Tutcerte tiel opinias multege da esperantistoj.

Eble samideano Igorj el Ruslando, kiu opinias malsame, estas nur sola ? Remigiusz Grzela tute pravas, ke kvankam tiam Pollando estis nur parto de Ruslanda Imperio, tamen la lando ne malaperis. Ĝi ekzistis, ĉar vivis gepoloj, kiuj sentis aliĝecon al sia vera, fakta lando - Pollando.

Iom simila situacio estis ankoraŭ antaŭ nelonge. Kiam ekzistis la rusaj respublikoj, ĉu tiam ekzemple litovo diris, ke li vivas en Sovetunio ? Mi ĉiam aŭdis, ke gelitovoj diris, ke ili loĝas en Litovio. Kvankam ili loĝis en Sovetunio, ili sentis sin gelitovoj kaj ili fakte tiuj estis.

Mi konsentas kun samideano Igorj, ke pli gravas, ke Esperanto naskiĝis, ke ĝi ekzistas, ol tio, en kies teritorio ĝi aperis. Tamen por multaj homoj la afero estas grava kaj interesa (ankaŭ por mi). Kun koraj salutoj"

**Kristina POREDA**

## Pri la Ĉenletero "DEMOGRAFIO"
(L!104)

Unue, mi tuj diras, ke mi samopinias kiel ĴANSEB, kiam li skribas, ke la okcidentanoj (t.e. okcidentaj Eŭropanoj, Nordamerikanoj, Japanoj, Sud-koreoj, Tajvanoj ktp) helpu nur la landojn, kiuj unue helpas sin mem. Tio devus esti drasta helpkondiĉo, manke de kio ne estas kialo por ke popoloj, kiuj respondece sin kondutas, respondecus plie por la popoloj, kiuj ne respondecas pri si mem. Tiu helpo celu rekte la popolamason, ne ties registarojn; ĝi konsistu ne el mono (kio nenion solvas), nek el alporto de manĝaĵo, kio montris jam perversan rezulton pro surloka malĝusta konkurenco kun la surlokaj produktantoj, sed el senpaga alporto de taŭga kaj adaptita al la tereno tekniko, post diskuto kaj komuna decido kun la lokaj interesatoj. Ĉina proverbo diras : "Ne donu fiŝon al mizera homo, instruu al li fiŝkapti mem."

Pruvon pri limoj de loĝatebleco oni povas tiri el la libro **"Les trente glorieuses"** de Jean Fourastié : tie oni



ekscias, ke ĝis la 19-a jarcento la nombro da franclandaj loĝantoj ne povis superi 20 milionojn : kiam tiu nombro estis atingita, sufiĉis unu jaro da por agrokulturo ne taŭga vetero, por ke ekestu terura milionopa malsatmortado, kion oni ne spertis sub 16 milionoj da loĝantoj.

Tio pruvas, ke la tero havas loĝlimojn. Tiuj limoj variis ekde la prahistoriaj tempoj, kiam la malmultaj homoj sin nutris per plukado kaj ĉasado en la sovaĝaj arbaroj, ĝis la nuntempo, kaj multe plivastiĝis pro la tre granda progreso de agrokulturo ĉefe de 1945a ĝis 1975a, sed kiu ankoraŭ, se malpli rapide, progresas. Sed de tiu tempo oni rimarkis, ke, kun la produktadaltiĝo altiĝis ankaŭ terure la "polucio" de la riveroj kaj subteraj akvoj ; la simpla multiĝo de homoj multigas ankaŭ la polucion. Tion oni klare vidas ĉe la marbordo, kiam kaŭze de feriantoj la loĝantoj duobliĝas aŭ triobliĝas, aŭ pli... Necesas konstrui akvotraktejojn tro grandajn, kiuj plene uziĝos unu aŭ du monatojn el dekdu !... En Afriko, ekzemple, la malfruiĝintaj popoloj ne zorgas pri tio : ili faros kun tempopaso siajn teritoriojn neloĝeblaj kaj la dezertoj progresos.

Alia sinteno, ol tiu kiun mi dekomence priskribis, ne eblas : laŭ informoj kiuj aĝas de 1975a, la proporcio de malriĉaj popoloj (Afriko, Hindujo, Sudameriko...) al "riĉaj" estis iom pli ol TRI al UNU, nun, la situacio pli malboniĝis kaj malboniĝos, laŭ la teruraj donitaĵoj de J.G. en L!104a.

PATRIKO, en sia humura artikolo de L!104a, proponas ke oni deprenu "fromaĝon" de la riĉuloj por doni al la malriĉuloj : li ne rimarkis, ke la manĝelspezoj de la "riĉuloj estas apenaŭ 20 % de iliaj elspezoj (ili ne manĝas 3 bifstekojn ; se ili tion farus, ili preparus por si gravajn hepatproblemojn), dum tiuj de la malriĉuloj proksimas al 100 % ; tiu konsidero montras, ke en 1975a unu riĉulo devus nutri ne 3 malriĉulojn, sed 3 / 0,2 = 15 !!! kaj nun certe pli !

La franca popolo povas esti konsiderata riĉularo (krom kelkaj, sed nun pli kaj pli malriĉuloj) : pli ol 98 % el la familioj posedas en 1993a fridujon, pli ol 85 % kolortele-

vidilon, 85 % lavmaŝinon, 75 % aŭtomobilon (kio estas multe, se oni konsideras, ke en la pariza regiono kaj en la liona la trafiko malebligas uzadon de aŭtomobilo) kaj 53 % proprietas sian loĝejon aŭ loĝdomon. PATRIKO verŝajne mem enkalkuliĝas kun tiuj "satuloj", sed kiel ni supre montris, li ne bezonas prepari por si steriligan tondilon, ĉar tio tute ne utilus al solvo de la problemo. Eĉ la aritmetika logiko volus kontraŭe, ke la riĉuloj ekstermu la malriĉulojn : tiel estus samtempe solvitaj : 1) la problemo de la malriĉeco, 2) tiu de la tera troloĝateco !...

La laŭ mi sola solvo estas tiu komence priskribita : aŭ la menciitaj popoloj taŭge reagos kaj ni helpos tiom forte kiom ni povos, aŭ ili ne reagos, kaj ni lasos la Naturon mem decidi, kio konsistas mem fortan trudforton. Ni ne havu iluzion, ke tio facile fareblos. Ĉinio tion ekfaris ŝajne kun sukceso sed kun malfacilo. Kun LEBEC (L!105a) mi pensas, ke ĉi-teme eklezioj kulpas, ĉar se ni supozas, ke oni lasus la aferon iri sen taŭga sinteno, okazos senmanke, ke pro neregita hommultiĝo ĉiuj homoj unue surtere mizeriĝos, kaj fine ĉiuj pereos. Ĉu tio estas la Dia volo ?

**J. MANCEAU**

La nigra - ĉu nevola ? - humuro de Antoine Pinay, 102-jara, iama ĉefministro, dufoje ministro pri financoj en Francio :

D : - S-ro Pinay, kion vi opinias pri la problemo de senlaboreco?

R : - Nun la scienculoj anstataŭigis homojn per maŝinoj...

D : - Do, kiu solvo al tio ?

R : - La scienculoj uzu sian sciencon por solvi la problemon...

(Ĉe la franca televido F2, la 25an de majo '93, 20h20) K.B.

## *RESPEKTINDA KAJ... MODERNA*

*Mi dankas Sinjoron Lopez Luna, ĉar li instruis al mi la eblecon uzi **sh, ch, jh...** ktp, anstataŭ **ŝ, ĉ, ĵ...** Laŭ mi, la supersignoj estas malavantaĝo por la uzo de Esperanto per la modernaj komunikiloj (ekz. "MINITEL" uzas nur majusklojn sen ĉapeletoj).*

***Universala lingvo devas esti laŭeble adaptebla kaj uzi la latinan alfabeton sen pliaj signoj. Tiel la angla lingvo** faras.*

*La germana havas la saman problemon kun la "umlaut" (¨). Antaŭ nelonge oni anstataŭigis ĝin per E kiam skribita majuskle. Tiamaniere oni povas fari en Esperanto au ech tute forlasi la chapeletojn. Tiam Esperanto havos la respektindecon de malnova lingvo, kun moderna skribmaniero kaj pasinta formo uzita de la praavoj !*

***Daniel***





**MINACO DE MALDUNGO**

**EN LA ARMIL-INDUSTRIO !**

## INTERNACIA KOMPLOTO KONTRAŬ LA LABORISTOJ !

Dum kreskadas la nombro da senlaboruloj en niaj "evoluintaj" landoj, en la frenezaj kapoj de pacistoj de Francio aperis la iniciato proponi unuflankan malarmadon de sia lando !

- Nu, vi trankviliĝe diros, ĉiam estis revemuloj, kaj ankoraŭ longe eblos revi...

- Sed fulmotondro, la situacio estas grava : Imagu ! Troviĝis en la franca Senato 5 (kvin) homoj, ne pli stultaj ol la ceteraj, por oficiale meti tiucelan leĝproponon sur la Buroon de l' Senato, la 21an de aprilo ! Ni ne plu revu : Se adoptita, la leĝo rekte trafus la laboristojn de unu el la plej prosperaj industrioj ! Mi ja legis la tekston de la leĝpropono : Oni ne nur ne plu fabrikus nek eksportus armilojn, sed oni iom post iom eĉ malaperigus ĉiujn armeojn, terajn, marajn, aerajn...! Kiom da kompatinduloj forĵetotaj al la sendungeco ! Kio fariĝos el ni ?

Karaj geamikoj de **Laŭte**, en- kaj eksterfranciaj, tiu plago poste riskus invadi viajn proprajn landojn ! Ne restu senfaraj antaŭ tia evento : urĝe diskonigu la aferon ! Pripetu, eĉ persekutu vian Parlamenton, ke ĝi taŭge reagu !

La francan tekston de la leĝpropono* petu ekzemple de **U.P.F.**, 4 rue Lazare-Hoche, F 92100 BOULOGNE

Mondcivitanoj, ek al (pacaj) armiloj !

Kribo

----

* la esperanta espereble aperu en L! Kiu komunikos ĝin al ni ?

ESPRIMARO FRANCA-ESPERANTA

ALDONENDAJ ESPRIMOJ ( komoilis : Lucien BOURGOIS )

force armée ( la ) : la armeanaro

force de frappe ( la ) : la armadfortoj

1176 ( par la force des choses ) - ajouter : nepre

1177 ( par la force du poignet ) - ajouter : per brakforto

force publique ( la ) : la polic(anar)o

forcer l'admiration : trudi admiron

forcer la note : troigi la kalkulon

1183 (dans son for intérieur ) - ajouter : interne de sia animo [Z]

1184 voir 1229

fort de ... ( se faire ) : 1) opinii sin kapabla ( + inf. )
2) nepre promesi, ke ...os

1196 ( la fortune des armes ) - ajouter /de la guerre : la militŝancoj

fou de rage : voir 1200

1208 ( fou furieux ) - ajouter : furiozfreneza

1210 ( fouiller du regard ) - ajouter : esplore rigardi

1223 ( foutre le camp ) - ajouter : forpafi sin

pop. foutre dedans ( se ) : erari

1224 ( en être pour ses frais ) - ajouter : vane strebadi

frais de la princesse ( aux ) : ŝtatpage

1230 ( franc comme l'or ) - ajouter : kun sincero el oro kaj fero

franchir le cap : transpaŝi

franchise ( en ) : senafranke

franco de port : afrankite

1239 ( des frères d'armes ) - ajouter : kunmilitintoj

froid ( avoir ) : senti malvarmon

froid de loup/de chien/de canard ( un ) : malvarmego voir 1281

1252 - ajouter : froti al si la ventron. Li pro ĝojo frotis al si la manojn [Z]

fuite ( être en ) voir 1960

1258 ( foudroyer du regard ) - ajouter : fulme rigardi

1260 ( faire gaffe ) : atenti ( se méfier ) : singardi

1261 ( à gages ) - ajouter : dungita

1262 ( le gagne-pain ) - ajouter : la perlaborado [Z]

1263 ( gagner du terrain ) - ajouter - sur qn : konkeri terenon

1266( gagner sa croûte ) - ajouter /sa vie : sin vivteni, lukri sian vivtenon

1270 ( de gaieté de coeur ) - ajouter : bonvole

1271 ( un gai luron ) - ajouter : ĝojulo

garde-à-vous ( être au ) : sin teni atente

1276 ( garder pour la bonne bouche ) - ajouter : gardi la deserton por la fino





# Vortoj de Maljunulo

## EL MIA GALERIO DE PORTRETOJ

### V. AMIKO ROBERTO

*Roberto D., du jarojn pli aĝa ol mi, estis kolego mia ĉe Pathé-Cinéma en JOINVILLE. Li estis tre kapabla kemiisto kaj tre kapabla diletanta kuiristo. Li diris : "Kemio estas branĉo de la kuirarto."*

*Tiam unu el niaj kolegoj nomita SEGI ricevis el provinco leteron : gekuzoj venontaj al Parizo okaze de ekspozicio anoncas sian viziton en sabato.*

*Tiam, antaŭ 1936, ni laboris sabate ĝis tagmezo. Hejmen venante, SEGI ekvidis tra la fenestro de sia kuirejo altan blankan ĉapon. Li pensis : "Mia edzino estas freneza : ŝi lue dungis profesian kuiriston por akcepti tiujn nekonatajn kuzojn!".*

*Malfermante la pordon de sia apartamento, li estis tuj ĉirkaŭita de pluraj personoj, kiuj kisis lin : "Kara kuzo!". Momente sufokita li rekonis ilin kaj balbutis : "Ha, estis vi, farsuloj!". Tio estis ja farso aranĝita de kelkaj gekolegoj, kiuj alportis ĉion por manĝo kaj drinko. Kaj Roberto diligente oficis en la kuirejo. La tagmanĝo estis tre gaja, kaj ankaŭ la cetero ĝis malfrue en la nokto.*

*Roberto, naskita en vilaĝo de okcidenta provinco, estis perfekta parizano. Li konis detale ĉiujn kvartalojn de la urbego, sciis precize, kie troviĝas speciala manĝaĵo, trinkaĵo, distraĵo, artaĵo, kuriozaĵo. Li povis esti bonega profesia gvidisto tra Parizo.*

*Li estis bona muzikisto. En sia fraŭla hejmo li regalis nin per elektitaj diskoj de Bach kaj Mozart ĝis Debussy kaj Ravel, kaj aŭtentaj Nov-Orleanaj ĵaz-pecoj. Li mem agrable ludis violonon, precipe en cigana maniero. Kun pianista amikino li iafoje improvizis laŭ elektita temo. Certe ne tre*

scienca muzika, tamen plaĉa por ni.

Li, kiel ni, amis la belegan voĉon de Marian ANDERSON kaj la hispanajn dancojn de Antonia NERCE "la Argentina". Iun vesperon ni sidis ĉe la unua fotelrango fronte al la scenejo, sur kiu ŝi dancis. Meze de aplaŭdoj, subite ni aŭdis konatan voĉon, kiu kriis ne : "Brave!" kiel multaj aliaj, sed "Dankon! Dankon!". Jen estas Roberto, diris mia edzino. Nin turnante, ni ekvidis lin staranta kun la mano sur la koro, tiel esprimanta sian admiron kaj sian emocion. Dankon! Dankon! diris Roberto, kaj al ni ŝajnis, ke la bela dancistino aparte distingas lin en sia saluto al la spektantaro.

Li havis naturan talenton de rakontisto. Ne fabelojn nek legendojn li rakontis, sed simplajn travivitajn faktojn, ĉiutagaĵojn, al kiuj li donis reliefon, koloron, kaj vivon per siaj voĉfleksoj, siaj gestoj, rigardoj kaj vizaĝesprimoj. Kiam li vizitis nin hejme, niaj gefiloj sidiĝis tajlore sur la pargeto fronte al li por ne perdi detalon el lia mimiko.

En la lastaj jaroj la maljuna Parizano forlasis la ĉefurbon kaj retiriĝis en sia naska vilaĝo, en sia naska domo. Li konatiĝis kun juna monaĥino, kiu entreprenis konverti lin. Sukcese. Mi konis Roberton ateisto kiel mi, sed en siaj fruaj jaroj la knabeto vizitadis katolikan katekismon. Kredeble rememoro el la kara infaneco helpis la retorikon de la religiulino. Tra liaj sinsekvaj leteroj mi konstatis lian evoluon : "Mi relernas tekstojn de forgesitaj preĝoj, mi ankoraŭ ne scias, ĉu mi iam konfesos kaj komunios..."

Al mia lasta letero respondis kuzo lia. Roberto mortis. Nekreeble! Li, kiun mi konis tiom viva, mi ne povas imagi lin rigida kaj inerta.

En sia testamento li postulis religian funebran ceremonion. La lopo estis fermita.

Ĉu samo okazos al mi ? Tre malprobable, ĉar :

Unue, mi neniam ricevis ian religian edukadon.

Due, mi ne konas elokventan monaĥineton.

Kara Roberto, se vi sidas nun en ĉielo dekstre de la Sinjoro, sendube vi preĝas por mia savo. Vane! Ho ve! Inter vi kaj mi estas netranssaltebla abismo. Neniam okazos nova renkonto inter ni. Neniam plu, amiko. Roberto kara, por eterne adiaŭ.

**VALO.**



## Pri du versoj de LA FONTAINE

En la "**Klasika periodo**" de Waringhien mi legis jenan tradukon de du versoj de LA FONTAINE :

Amo sen fik' estas nemulte.
Fiko sen am' estas nenio.

Ha! tiuj poetoj! Kutimaj je metaforoj kaj hiperboloj, ili ofte troigas en la esprimo de siaj pensoj. La leganto korektu kaj moderigu ĝin per komparo kun propraj spertoj. Du konkretaj ekzemploj :

### AMO SEN FIKO : KLARA

Li estis tridekjara. Ŝi estis deksepjara kaj virga. Ĉu vi ridas ? Vi sciu, ke en tiu epoko, post la dudeko da "folaj jaroj" kaj la tempo de la "in-fraŭloj" multaj deksepjaraj knabinoj estis ankoraŭ virgaj. Sendube estintus facile al tridekjara spertulo pluki la floron de tiu naiva infano. Tion li ne volis. Li respektis ŝian virgecon kaj neniam bedaŭris.

Ili konatiĝis dum somerferio sur plaĝo ĉe Maniko. Ili ludis kun infanoj sur sablo, ili kune naĝis en la maro, ili iafoje interparolis. Nek amindumado, nek flirtado, sed la okuloj elokvente parolis.

Venis la fino de lia libertempo. Vespere, jam nokte, ili iris al la stacidomo sur pado, tra arbareto. Lia edzino marŝis antaŭe, babilante kun kelkaj personoj. Li sekvis malrapide, malgaje pensante pri Klara, kiun li neniam revidos.

Subite ŝi aperis kiel fantomo en la lunhelo, kun montra fingro sur la lipoj ŝi senbrue proksimiĝis, ŝi senparole prezentis al li sian duone malfermitan buŝon. Longa kiso estis ilia unika iom erotika gesto. Poste ŝi flustris al lia orelo sian nomon kaj sian adreson kaj malaperis en la nokto. Sekvis kvinjara interŝanĝo de leteroj inter Parizo kaj Metz, sola esprimo de iliaj reciprokaj sentoj. Fine ŝi anoncis sian baldaŭan edziniĝon al amiko de sia frato.

Li decidis tuj ĉesigi la korespondadon, ĉar li sciis kiom danĝera ĝi estus por la paco de geedza paro. En sia adiaŭa letero li sincere deziris al ŝi feliĉan vivon kun bona edzo kaj belaj infanoj. En ŝia kortuŝa adiaŭa respondo

*la inko de kelkaj vortoj estis parte diluita de larmoj falintaj sur la paperon.*

*De sia edziniĝo, ankaŭ ŝi loĝis en Parizo, sed ili neniam interrenkontis. Ili neniam plu sciis ion unu pri la alia. Sed li neniam forgesis ŝiajn grandajn helbluajn okulojn, ŝian sveltan talion kaj la guston de ŝiaj lipoj. Ne diru al li, ke tio estas neglektinda nemulto.*

*FIKO SEN AMO : ALICA*

*Ili estis geamikoj, ne geamantoj. Ŝi estis dek jarojn pli juna. Tamen li trovis ŝiajn opiniojn retroajn. Ili ofte diskutis: pri politiko, religio, moralo, edukado de infanoj - kaj neniam akordiĝis.*

*Sed inter iliaj korpoj estis mirinda sens-akordo.*

*Kredeble La Fontaine, lerta tradukinto de la erotikaj fabeloj de BOKAĈO, mem ĝuis tiajn momentojn de intensa volupto, kvankam sen vera amo.*

*Sendube amo kun fiko estas klimakso de plezuro kaj feliĉo. Sed amo sen fiko (mi ne diris sen deziro) aŭ fiko sen amo (sed almenaŭ kun reciproka simpatio) certe estas nek nenio, nek nemulto.*

***

## Kiel bilanco de jarcento

***La** dudeka jarcento komenciĝis promesplena. El tiuj promesoj kion faris ni, fuŝuloj kaj frenezuloj ? Ni travivis du gigantajn militojn kun milionoj da mortoj, milionoj da vunditoj kaj amasoj da ruinoj, plus la hispanan tragedion, plus aliajn militojn : Balkanoj, Koreio, Vjetnamio, Alĝerio, k.c. Kaj la listo ne estas finita.*

*Dume la scienculoj kaj teknikistoj efektivigis grandajn progresojn. Ili praktike solvis la problemon pri produktado, sed ne la problemon pri disdonado kaj konsumado. Oni detruas nevendeblajn varojn, precipe nutrajn, dum homoj kaj infanoj mortas pro malsato, terura paradokso.*

*Ni konstatis la grandan anstataŭigon de la homoj per la maŝinoj, anoncitan de DUBOIN kaj BELLAMY, kun la konsekvencoj de ili antaŭviditaj : kreskanta senlaboreco kaj mizero en abundo. Okazis vera revolucio. Ŝajne niaj brilaj teknokratoj, niaj distingindaj ekonomikiistoj kaj niaj belparolaj politikistoj ne komprenis, ke al revolucia situacio devas respondi revoluciaj rimedoj, kiuj necesigus imagpovon kaj volon. Ili daŭre aplikas receptojn inventitajn en la deknaŭa jarcento, kiam la cirkonstancoj estis tute aliaj.*



*Per tre profundaj plugadoj kaj per trouzo de kemiaj sterkoj oni elĉerpis la naturajn riĉojn de la grundo. Dum kelkaj jaroj oni ricevis rekordajn rikoltojn, sed poste la tero malriĉiĝis kaj iom post iom fruktodonaj kampoj fariĝas dezertoj.*

*Oni detruas arbaregojn, kiuj estas pulmoj de la planedo. Oni venenas la teron, oni venenas la aeron. Oni poluas riverojn kaj eĉ marojn, kiuj ĝis nun ŝajnis neelĉerpeblaj vivtrezorujoj. Oceanologoj ĵetis alarmkrion : Mediteraneo povos fariĝi morta maro.*

*Oni ne atentas pri poluado eble plej grava, nome la termika. Per bruligado de fosiliaj brulaĵoj (karbo, petrolo, metano); per la "forceja efiko" de karbona dioksido ; per nemodera ekspluatado de ĉiaj energioj, inkluzive de la nuklea, kiuj nepre degradiĝas je varmo, ni preparas plialtiĝon de la atmosfera temperaturo. Komencos fandiĝi la dikega glacitavolo de Antarktiko. Tiu fenomeno akceliĝos kaj povos atingi sojlon trans kiu ĝi fariĝos neinversigebla. Tiam neeviteble plialtiĝos la marnivelo. Submergite malaperos havenoj, grandegaj urboj kaj vastaj ebenkampoj, dum la homaro daŭre multiĝos. Ĝi kuros senhelpe al pereo.*

*Karaj legantoj, se vi legis ĝis tie ĉi, eble vi pensas : "Ĉifoje la maljunulo vere maljuniĝis. Li fariĝis freneza aŭ mense kaduka."*

*Elerarigu vin, kamaradoj. Tiuj maltrankviligaj profetaĵoj ne ĝermis en mia ŝima cerbo. Mi nur citis avertojn donitajn de eminentaj sciencistoj, kiuj serioze pristudis la demandon kaj sobre taksis eventualajn konsenkvencojn. Ili estas rigardataj kiel grandaj kleruloj, spertuloj, saĝuloj, sed ne aŭskultataj. Kvazaŭ la homoj sin allasus al fatalo aŭ pensus : "Post ni, la diluvo!". Sed post ni, tio ne signifas post longa tempo. La danĝero minacas niajn jam vivantajn idojn. Se la kataklisma procezo ne estos tre baldaŭ haltigita, morgaŭ estos tro malfrue. Morgaŭ, tio estas eble en la unuaj jardekoj de*

*la dudekunua jarcento.*

*Ĉu do malesperi ? Mi ne povas akcepti la ideon, ke jam venis la krepusko de nia speco. Kion faris la homoj pro nescio kaj senpripenso, tion ili povos haltigi per scio kaj volo. Ni vekiĝu, ekkonsciu kaj konsekvence ekagu laŭcele kaj vigle. Se sufiĉe frue kaj efike la teranaro estos por longa tempo plu savita. Tiel estu !*

***VALO***

---

**Nia felietono :**

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO **12**

de Petro **USPENSKO (OUSPENSKY)**

(resumpecoj)

SUBJEKTIVA SCIENCO KAJ OBJEKTIVA SCIENCO (el la 14ª ĉap.)

La tuta ordinara scienco (bazita sur observado kaj eksperimentado) estas subjektiva scienco.Nur la scienco pri la Tuto, nome, la scienco pri la aĵoj en si mem (bazita sur antikvaj metodoj kaj principoj de observado) estas objektiva scienco.

UNUECO EN DIVERSECO

Unu el la centraj ideoj de la objektiva scienco estas la ideo de la UNUECO DE ĈIUJ AJOJ, de la unueco en la diverseco.

Sed ĉi tio ne povas esti perceptata de la subjektiva konscienco;unue oni devas disvolvi objektivan konscienCon, per kiu estos eble vidi kaj senti la "unuecon de ĉiuj aĵoj". Male, per la subjektiva konscienco la mondo estas fragmentita en milionojn da fenomenoj apartaj kaj sen konekto.



TRANSDONO DE LA OBJEKTIVA SCIENCO PER SIMBOLOJ

Sed la ordinara lingvo subjektiva ne povas transdoni kun klareco kaj pleneco la ideon de la unueco, tial oni esprimis ĝin en formo de mitoj kaj simboloj,(La aforismoj estas resumo de l'enhavo de mitoj k simboloj) kun la celo ke ili atingu la superajn centrojn de homo (ĉar ĉi tiu speco de ideoj estas nealireblaj per la racio).

La mitoj estas destinitaj al la supera emocia centro; la simboloj, al la supera intelekta centro.


La simboloj kiuj transdonas la ideojn de la objektiva scienco inkludas la diagramojn de la fundamentaj leĝoj de l'universo, kaj transdonas ne nur la sciencon mem, sed ankaŭ la manieron atingi ĝin.

Inter la aforismoj (kiuj resumas la enhavon de multaj simboloj) elstaras ĉi tiu: "KIEL ESTAS SUPRE, TIEL ESTAS MALSUPRE" (el la Tabelo de Smeraldo, de Hermeso Trismegisto). Ĉi tiu formulo signifas ke ĉiuj kosmaj leĝoj povas troviĝi en la atomo. La sama signifo troviĝas en la analogio establita inter la makrokosmo (la universo) kaj la mikrokosmo (la homo).

La fundamentaj leĝoj de la triopoj kaj de la oktavoj penetras ĉiujn aĵojn kaj devas esti simultane studataj en la universo kaj en la homo. Sed, ĉar la homo estas studobjekto pli proksima kaj pli alirebla,li devas ekstudi en si mem la fundamentajn leĝojn de l' universo. Tial alia aforismo:"KONU VIN MEM",havas profundan sencon, ĉar ĝi kondukas al la kono de l'vero.Tial la homo studante sin mem, studas la universon, kaj studante la universon kaj ĝiajn leĝojn, li studas sin mem.

SISTEMO DE SIMBOLOJ (GEOMETRIAJ FIGUROJ K NOMBROJ)KIUJ ESPRIMAS LA HARMONIAN DISVOLVIĜON DE HOMO.

Por homo, simbolo estas sintezo de kono, kaj taŭgas por esprimi tiun konon kaj transdoni ĝin.

La simboloj(geometriaj figuroj): 

aŭ la nombroj, kiuj esprimas ilin: 2, 3, 4, 5, 6,havas

difinitan sencon en rilato kun la interna disvolviĝo de homo; ili montras malsamajn gradojn en la vojo de memperfektiĝo kaj de kresko de esto.


La homo en sia ordinara stato estas konsiderata DUALECO. La formiga aparato konsistas el dualecoj,aŭ "paroj de kontraŭoj"; ĉiuj impresoj de homo, liaj pensoj, sentoj, sensacoj, estas dividitaj en pozitivaj kaj negativaj, utilaj kaj malutilaj, necesaj kaj superfluaj, bonaj kaj malbonaj, agrablaj kaj malagrablaj.La laboro de la centroj fariĝas sub la signo de ĉi tiu divido.La pensoj opponas al la sentoj.La motoraj impulsoj oponas al la instinkta soifo de trankvileco. En ĉi tiu dualeco fariĝas ĉiuj perceptoj,ĉiuj reagoj,la tuta vivo de homo. Sed ĉi tiu dualeco manifestiĝas en alterna formo:la venkinto de hodiaŭ estas la venkito de morgaŭ; kio nuntempe regas nin, baldaŭ estos sekundara, subordigita. Kaj ĉio estas egale meĥanika,senigita de volo, sen celo.

La kompreno pri ĉi tiu dualeco aperas kiam ni kaptas la diferencon inter kio estas aŭtomata kaj kio estas konscia. La batalo por submeti tion aŭtomatan al tio konscia, konsistigas la 3-an principon -permanentan principon-, per kio la dualeco transformiĝas en triunuon (nome, tio binara, en tion ternaran). Ĉi tiu decido de batalo konstante aplikata en ĉiuj okazaĵoj kaj situacioj, kondukas al la transformiĝo de tio ternara en tion kvaternaran, nome,de 3 al 4; la sekva grado,la transformiĝo de 4 al 5 havas plurajn signifojn, kaj la ĉefa estas tiu rilatanta al la laboro de la centroj.La centroj estas 5: intelekta, emocia, instinkta, motora kaj seksa. La transformiĝo de 4 al 5 signifas ke la 5 centroj atingis harmonian disvolviĝon,nome,ke ili kunordiĝe kaj harmonie laboras. Ĉi tio permesas al homo konekti sin kun la superaj centroj, kaj rekte kontakti kun la objektiva konscienco, kaj la objektiva scienco, per kio 5 pasas al 6, nome al la 6-pinta stelo nomata: Sigelo de Salomono aŭ Stelo de Davido.

La pura kono ne povas esti transdonata, sed esprimita per simboloj, ĝi troviĝas kovrita kvazaŭ per vualo kiu, por tiuj dezirantaj vidi ĝin, kaj sciantaj kiel rigardi ĝin, ĝi fariĝas travidebla!




LA ENEAGRAMO (Figuro aŭ cirklo dividita en 9 egalajn partojn. Precipa simbolo de la Psiko-transformismo)




La eneagramo esprimas la Leĝon de 7 en ĝia rilato kun la leĝo de 3. La cirklo reprezentas atingitan ciklon (kompletan, fermitan):La nulo de l'dekuma sistemo.

La fazoj de l' procezo estas signitaj per la nombroj de 1 al 9.

La supro de l' triangulo signas la komencon k la finon de ĉiu ciklo; ĝi estas la punkto kie fandiĝas komenco kaj fino,kie la cirklo fermiĝas, kie ĝi resonas kiel la 2 DO de la oktavo (cikla fluo sen fino)Sed estas la 9a punkto, (responda al DO)kiu fermas kaj denove komencas la ciklon.





Oktavo dividiĝas en 7 malegalajn partojn, sed en la grafika reprezento, ĉi tiu malegaleco ne estas prenita en konsidero,kaj por la konstruo de l' diagramo, oni prenas unue unu seponon, poste 2,3, 4, 5, 6, kaj 7 seponojn.

EN DECIMALOJ: (Ĉi tiuj periodaj decimaloj ŝanĝas siajn lokojn laŭ difinita sinsekvo, tiel ke kiam oni konas la unuan ciferon de l'periodo,eblas rekonstrui la tutan periodon.)

1/7 = 0,142857...
2/7 = 0,285714...
3/7 = 0,428571...
4/7 = 0,571428...
5/7 = 0,714285...
6/7 = 0,857142...
7/7 = 0,999999...

Metante la nombrojn 1 al 9 sur la cirkonferenco,ni konektas la respondajn punktojn per rektaj linioj laŭ la ordo de l'periodo (determinita de la nombro de kiu ĝi eliris.) -La nombroj: 3-6-9

ne estas inkluditaj en la periodo, kaj formas la apartan triangulon, la triunuon de l'simbolo.




Farante la teozofian adicion de ĉiu duopo de ciferoj de l'periodo(8+1; 7+2; 6+3; 5+4) ni ekhavas 9, nome,tutan oktavon.

La pozicio de la notoj respondaj al la ciferoj de l'periodo,kaj la desegnaĵo de oktavo estus tia: (Vidu la apudan bildon)

La triangulo 9-3-6(kiu ligas la 3 punktojn de la cirkonferenco ne inkluditaj en la periodo) konektas la leĝon de 7 kun la leĝo de 3. La 3ª kaj la 6ª respondas al la 2 "intervaloj" de la oktavo;la 9ª respondas al la fundamenta noto (DO), kiu ne eniras en la periodon.

Ĉi tiuj 2 figuroj kombinitaj(la triangulo kaj la periodo = leĝo de 3 kaj leĝo de 7) prezentas la internan strukturon de la oktavo kaj de ĝiaj notoj.

Studante la homon, ni studas la kosmon, kaj studante la kosmon, ni studas la homon.

Laŭ la leĝo de 3, la kosma oktavo (=Radio de Kreado: Absoluto-Luno) estas dividita en 3 subordigitajn oktavojn. En ĉi tiuj 3 oktavoj, la kosmo estas kiel la homo: la samaj "3 etapoj", la samaj "3 ŝokoj".

Ĉiu kosmo, ĉiu organismo,ĉiu planto estas eneagramo, kvankam ne ĉiuj havas internan triangulon.

La eneagramo estas universala simbolo. La eneagramo estas la fundamenta hieroglifo de universala lingvo, kiu posedas tiom da malsamaj sencoj, kiom da malsamaj niveloj de homoj ekzistas.La eneagramo estas la eterna movado, vane serĉata ekde la plej fora antikveco, ĉar la homoj serĉis ekster si mem tion, kio estis interne de ili! Ili klopodis konstrui eternan movadon kiel oni konstruas maŝinon, sed la eterna movado estas parto de



alia movado kaj ne povas esti kreita ekster ĉi tiu!

Tial, la eneagramo estas la reprezento de maŝino de eterna movado. Ĝi estas la eterna movado kaj, ankaŭ la filozofa ŝtono de la alĥemiistoj! Scii interpreti kaj uzi ĉi tiun diagramon donas al la homo grandan povon!! La eneagramo por esti komprenata, devas esti konsiderata KIEL ESTANTA EN MOVADO,movanta sin!La viva simbolo moviĝas. La eneagramo turniĝas!

SUBJEKTIVA ARTO KAJ OBJEKTIVA ARTO

Ĉiuj konversadoj pri la arto estas tute senigitaj de senco.Tio,kion la homoj diras,havas neniun rilaton kun tio,kion ili pensas kaj ili eĉ ne rimarkas tion.

Aliflanke estas perfekte senutile provi ekspliki la verajn rilatojn de la aĵoj al persono kiu eĉ la abocon ne scias pri si mem!

Estas 2 klasoj de arto:Subjektiva arto kaj objektiva arto. Ĉio, kion ni konas, ĉio, kio nomiĝas arto,estas subjektiva arto!

Ekzemple, oni diras: "¡Artisto kreas!" Sed ĉi tiu esprimo estas vero nur por la objektiva artisto.Pri la subjektiva artisto oni devus diri nur ke en li "ĝi kreiĝas"! La diferenco estas grandega. Krome, oni atribuas al la subjektiva arto nevariigeblan agon, nome, oni kredas ke ĉiuj same reagas al la verkoj de subjektiva arto, ekzemple, la homoj imagas ke funebra marŝo estigas en ĉiuj malĝojajn kaj solenajn pensojn, kaj ke Napolana tarantelo estigos gajajn pensojn! Fakte ne okazas tiel; ĉio dependas de la asociiĝoj. Se iun tagon, aŭdante unuafoje funebran marŝon aŭ malgajan muzikon, mi sentas min treege feliĉa, partikulare kontenta, tiu muziko estigos en mi ĝojajn pensojn! Kaj inverse, se iun tagon mi suferas pro granda malfeliĉo, kaj aŭskultas gajan muzikon,tiu muziko ĉiam estigos en mi malĝojigajn pensojn!

¡Tiel okazas kun ĉio! La sama pejzaĝo povas estigi sensacon de ĝojo en unu kaj de malĝojo en alia.

La efekto produktata de subjektiva arto estas ĉiam AKCIDENTA!!!, male, la efekto produktata de objektiva arto estas ĉiam la SAMA!;ĝi estigas la saman impreson.

En la subjektiva artisto, la verko kreiĝas per si

mem, nome, la artisto estas regata de ideoj,pensoj kaj humoroj, kiujn li mem ne komprenas kaj pri kiuj li ne havas eĉ la plej etan kontrolon, nome,la verko kreiĝas akcidente,laŭ la naturo de l' hipnoto en kiu li vivas. Kaj la impresoj, kiujn li estigas en la spektanto, estos egale akcidentaj depende de liaj humoroj, gustoj, kutimoj. En la subjektiva arto ĉio estas variigebla, nepreciza, akcidenta, BAZITA SUR ASOCIIĜOJ.

En la vera arto,nenio estas akcidenta, ĉio estas antaŭcipe kalkulita kaj antaŭvidita. La objektiva artisto "kreas" fakte, nome, li enkondukas en sian verkon la ideojn kaj sentojn kiujn li volas(li scias k komprenas la mesaĝon kiun li volas transdoni),kaj la impreso kiun lia verko estigas en la homoj estas absolute nevariigebla kaj preciza; ĝi estas konscia arto.Lia verko ne povas estigi iun impreson en unu homo, kaj alian tute malsaman en aliulo,kompreneble, kondiĉe ke la personoj estu de sama nivelo.Lia verko estigos ĉiam kun matematika certeco la saman impreson.Tamen la sama art-verko estigas malsamajn efektojn en homoj de malsama nivelo! Ekzemplo de objektiva art-verko: La Sfinkso de Egipto. LA MUZIKO. La objektiva muziko baziĝas sur la internaj oktavoj, kaj povas doni precizajn rezultojn, ne nur de psikologia ordo, sed ankaŭ de fizika ordo.Ekzistas muziko kapabla subite mortigi homon, aŭ faligi muregojn! (per la vibradoj!). La muziko de la sorĉistoj de serpentoj inklinas al la objektiva muziko,sed en primitiva maniero; ĝenerale, temas pri unu sola noto, apenaŭ modulata k nedifinite plilongigata;en ĉi tiu simpla noto senĉese disvolviĝas "internaj oktavoj",k en ĉi tiuj oktavoj disvolviĝas neaŭdeblaj melodioj,sed sperteblaj de la emocia centro. La serpento aŭdas, aŭ pli bone, perceptas ĉi tiun muzikon kaj obeas ĝin. Muziko de ĉi tiu klaso, sed iomete pli kompleksa,obeigus la homojn.

La objektiva arto postulas almenaŭ fulmobrilojn de objektiva konscio, grandan internan unuecon kaj grandan memregadon!

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO

***





**interesatoj de Esperanto estas tre malgranda. Mia emo helpi la plej malfortajn homojn kaj movadojn pli ol la fortajn malbalancigas tiel miajn respektivajn okupiĝojn pri la lingvo kaj pri la socio. Pliigis tion la fakto, ke okupiĝo pri Esperanto helpas min kiel lingviston, kaj inverse; sed tio malmultege valoras por la homaro, nek la fakto ke Esperanto multe direktis mian vivon: ne nur pro vojaĝado, sed precipe ĉar nur pro Esperanto mi ŝanĝis mian loĝlandon el de Nederlando al Aŭstralio (aŭstraliaj Esperantistoj farebligis la transmigradon de mi kaj edzino kaj du infanoj).**


**Kiam mi kelkfoje retrorigardas mian vivon por vidi, ĉu valoris vivi, mi ĉiam konkludas, ke mia vivo valoris neniom rilate miajn okupiĝojn pri lingvismo, pri muziko, kaj pri politiko, ĉar pri tiuj aferoj jam okupiĝas tre multaj homoj tiel ke mi estis superflua. Kaj neniom pro mia vivtena laboro kiel lingvoinstruisto, ĉar jam estas sufiĉe da tiaj. Kaj neniom por esti edzo, patro, kaj avo, ĉar ĉiu viro, aŭ preskaŭ ĉiu viro, kapablas edzi kaj patri kaj avi; eĉ mi malvaloras en tiu rilato, ĉar jam ekzistas tro da homoj. La nure nura valoro, kvankam tre malgranda, de mia vivo estis la laboro por Esperanto, ĉar nur Esperanto bezonis min. Simple pro la fakto ke Esperanto havas tro malmultajn helpantojn. Same mi konsideras la vivon de ĉiuj aliaj Esperantistoj valora por la homaro, kune kun la Bethovnoj, la Ajnstajnoj kaj la Rembrantoj. Bedaŭrinde la plejmulto el la Esperantistoj ne konscias pri sia granda graveco, kompare kun Neesperantistoj ĝenerale.**

**Kvankam mi ŝatas tre multe Esperanton kiel geniaĵon, kaj la kreinton kiel tre utilan por la homaro, mi konsideras ĝin multe malpli grava ol ŝajnigas la energio kiun mi donis al ĝi. Krome nuntempe (precipe post la lasta mondmilito) min devigas malgrava juĝi Esperanton la konstato, ke la plej aktiva kaj la plej elstara (pli ĝuste: "sin elstariga") parto de la Esperantistaro, tiu parto kiu precipe respondecas pri la uzo kaj praktikigo de la lingvo, animfacile, ludeme, kaj nekompetente traktas la lingvon kaj tiel ĝin degenerigas al nefidebla kaj neutila interlingvo similiĝanta la en interpopolaj rilatoj nefideblajn kaj neutilajn lingvojn etnajn (nature kreiĝintajn kaj daŭre ŝanĝiĝantajn). Evidentiĝas, ke pro la inerteco kaj pro la malmulteco de la seriozaj Esperantistoj tiu**

degenero jam ne plu estas haltigebla. Kun la rezulto, ke la lingvo fariĝis nur ludaĵo interesa sed por la tuta homaro ne plu valora. La seriozaj Esperantistoj evidente ne havas la kuraĝon nek la energion savi la Zamenhof'an lingvon el la fuŝado per neologismoj kaj per nefidebligo de (= ante) la gramatiko(n) (t.n. progreso, kiu estas nur ŝanĝiĝado). La veraj Esperantistoj (kontraŭe al la "eminentularo" kiu nur ludas per kaj pri ĝi kaj tial estas nur Esperantaĉuloj) ne konscias ke estas pro ilia propra inerteco ke Esperanto perdas sian ekzistorajton kaj ne valoros akceptati de la homaro. Bela sonĝo malaperis, sed ankoraŭ valoras batali, sen Esperanto bedaŭrinde, por la justigo de la homa kunvivado.

Marcelo Leereveld.

---


"... La **Gramatiko** de Malovec estas tre bona, sed viaj "**Abrégé**" kaj "**Eléments**" ŝajnas al mi pli bone adaptitaj al niaj studantoj. Domaĝe, ke vi ne povis presigi la "**eléments**" kiel suplementon al via "**abrégé**", ĉar la tuto faras ĝuste resumon de ĉio plej utila, klare prezentitan kaj rekomendindan por ĉiuj kursanoj.

Kun miaj gratuloj por tiu bonega laboraĵo kaj miaj amikaj sentoj."

El letero de **Gaston WARINGHIEN** al L. LENTAIGNE (27.X.1988)

Jen nun realigita la deziro de Waringhien ! Estas finfine disponebla la nova eldono - en ununura broŝuro de **"Abrégé pratique"** kaj **"Grammaire & Esperanto"**, 64 p., 15 FF (afranko inkl.) - 20%-rabato ekde 10-ekzemplera mendo. Cercle amical espérantiste, F 47470 Beauville.


---

**- la venonta numero aperos komence de septembro -**

---

Gérant & imprimeur : Baudé - F 47470 Beauville. CPPAP 58651

Suplemento al LAŬTE n°106

# NACIECAJ PROBLEMOJ

Roza Luksemburg



* Naciecaj problemoj kaj aŭtonomio
* Imperiismo, naciismo kaj socialismo

Roza Luksemburg (1871-1919) naskiĝis en Polio kaj estis kunfondintino de la Socialdemokrata Partio de Pollando. En 1898 ŝi venis al Berlino el Svisio kaj aliĝis al la Germana Socialdemokratio.

"**Socia Reformo aŭ Revolucio**" nomiĝis ŝia unua polemiko kontraŭ Bernstein kaj liaj adeptoj, kaj kiam ĉilastaj dum la Stuttgarta partia kongreso riproĉis al ŝi ŝian junan membrecon de la germana Socialdemokratio, ŝi respondis : "*Mi scias, ke mi ankoraŭ devos meriti miajn epoletojn en la germana movado ; sed mi volas fari tion en la maldekstra flanko, kie oni volas kontraŭbatali la malamikojn kaj ne en la dekstra, kie oni volas kompromisi kun la malamikoj*".

Ĉi tiun intencon ŝi efektivigis, apud Liebknecht, kiel gvidantino de la germanaj maldekstruloj kaj kunfondintino de la Spartakus-ligo ĝis kiam ŝi estis murdata, en 1919.

En "**Amasstriko, Partio kaj Sindikatoj**" ŝi analizis la spertojn de la rusa revolucio de 1905, en la "**Junius-broŝuro**" (1916) ŝi senmaskigis la demagogion de la regantaj klasoj dum la unua mondmilito kaj kiam, en 1919, la revolucio ekflamis, ŝi prezentis la partiprogramon de la germana kompartio.

# NACIECAJ PROBLEMOJ

# KAJ AŬTONOMIO

(Tiu ĉi teksto estis verkita en 1908-1909 por pola gazeto en la tiama rusa imperio ; ĝi estis unua parto de serio da artikoloj).

En ĉi tiuj artikoloj estas funde diskutata la sinteno de la socialdemokratio, t.e. la marksismaj socialismaj partioj tiutempaj, rilate la naciecajn problemojn, precipe en la rusa imperio, al kiu apartenis ankaŭ pollandaj regionoj. En la artikoloj Roza Luksemburg atakas la 9-an punkton de la programo de la Socialdemokrata Laborista Partio de Rusio ; ĝi tekstas jene : "La partio alstrebas demokratian respublikon, kies konstitucio garantios al ĉiuj naciecoj, kiuj apartenas al la ŝtato, la rajton je memdispono". Komparinte ĉi tiun punkton kun la konkretaj punktoj ekz. en la programo de la aŭstria socialdemokratio, Roza Luksemburg i.a. rimarkigas :

*... "Estas evidente, ke la formulo pri "La rajto je memdispono de la nacioj" donas neniun praktikan direktivon por la ĉiutaga praktiko de la proletaro, neniun praktikan proponon por solvi la problemon pri naciecoj. Ĉi tiu formulo ekzemple ne montras al la rusa proletaro, kiel ĝi povus helpi solvi la naciajn problemojn de Polio, de Finnlando, de la Kaŭkazo, de la judoj, ktp, ĝi pli similas plenan rajtigon de ĉiuj interesitaj "nacioj", solvi la naciajn aferojn laŭ sia bontrovo. La nura praktika konkludo, kiun oni povas fari el ĉi-supra formulo por la ĉiutaga praktiko politika de la laborista klaso, estas la direktivo, ke ĉiuj manifestadoj de nacia subpremado devas esti kontraŭbatalataj.*

*Se ni rekonas la rajton de ĉiu nacio je memdispono, ni logike kompreneble devas kondamni ĉiun specon de kuratoreco pri iu nacio, la perfortan altrudon de iu nacia ekzistoformo far iu alia nacio. Tamen la devigo protesti kaj kontraŭbatali la nacian subpremadon ne sekvas el iu speciala "rajto de la nacioj" por la klasa partio de la proletaro, same kiel ekzemple ĝia strebado al socia kaj politika egalrajtigo de la seksoj fontas ne el iu speciala "rajto de la virinoj", sur kiu apogas sin la movado por egalrajtigo de la burĝaj virinoj. La devigo sekvas nur el la ĝenerala kontrasto al la klasa sistemo, al ĉiu formo de socia malegaleco kaj regado, unuvorte, el la principa vidpunkto de la socialismo.*



*Sed cetere la menciita direktivo por la praktika politiko havas tutsimple negativan karakteron. La devigo batali kontraŭ ĉiuj formoj de nacia subpremado, absolute ankoraŭ ne donas klarigon pri tio, al kiaj rilatoj kaj al kiaj politikaj formoj la konscia proletaro en Rusio nuntempe devas strebi, cele de aranĝo de la polaj, letonaj, judaj kaj aliaj naciaj aferoj, kies programo en la nuna batalo de klasoj kaj partioj devas kontrasti al tiuj de la diversaj burĝaj, naciismaj kaj pseŭdosocialismaj partioj.*

*Unuvorte, la formulo pri "la rajto je memdispono de la nacioj" funde ne estas politika kaj programa direktivo por trakti la problemon pri naciecoj, sed iomete evito de ĉi tiu problemo.*

*Jam la nedifinita kaj ŝablona karaktero de la naŭa punkto en la programo de la Socialdemokrata Partio de Rusio montras, ke tiamaniere solvi problemon estas fremda al la marksisma socialismo. Iu "Rajto de la nacioj", kiu egale povus esti aplikata al ĉiuj landoj kaj al ĉiuj tempoj, estas nenio alia ol metafizika frazo de la speco pri "Homaj Rajtoj" kaj "Civitanaj Rajtoj". La dialektika Materialismo kiel bazo de la scienca socialismo por ĉiam senvalidigis tiajn "eternajn" formulojn. Ĉar la historia dialektiko montris, ke "eternaj" veroj kaj sekve ankaŭ "rajtoj" ne ekzistas, ke laŭ la vortoj de Engels, "tio, kio nun kaj ĉi tie estas bona, en alia tempo kaj alia loko povas esti malbona kaj inverse", kaj ke tio, kio ŝajnas en iuj cirkonstancoj prava kaj prudenta, en aliaj cirkonstancoj fariĝas malprava kaj sensenca. Kontraŭe, la historia Materialismo nin instruis, ke pri la reala enhavo de tiaj "eternaj" Veroj, Rajtoj kaj Formuloj ĉiukaze decidas nenio*

*alia ol la materiaj sociaj cirkonstancoj de ekzistanta ĉirkaŭa mondo kaj de cerba historia epoko.*

*El ĉi tiu vidpunkto, la scienca socialismo revizias la tutan, de la burĝaro hereditan trezoron de demokrataj frazoj kaj ideologia metafiziko. Por la nuna Socialdemokratio tiaj belaj aferoj kiel "Demokratio", "Burĝa Libero", "Egaleco" kaj similaj jam delonge ne plu estas Veroj kaj Rajtoj, kiuj majeste ŝvebas super homoj kaj tempoj, super ĉiuj nuboj. Kontraŭe, la Marksismo ekzamenas kaj traktas tiajn esprimojn nur kiel esprimojn de iuj historiaj rilatoj, kiel kategoriojn, kies materia enhavo kaj do ankaŭ politika valoro eterne ŝanĝiĝas ; tiu daŭra ŝanĝiĝo estas laŭ la marksismo la sola "eterna" Vero.*

*Kiam Napoleono aŭ aliaj despotoj tiaspecaj uzas la referendumon, tiun radikalan formon de politika demokratio, por la celoj de la cezarismo, kaj tiel fiutiligas la politikan indiferenton kaj la ekonomian dependecon de la popolamasoj, ni ne hezitas energie batali kontraŭ tia "demokratio", ĉar ni absolute ne konfuziĝas pro iu majesta ĉiopovo de la popolo, kiu estas kvazaŭ netuŝebla idolo por la metafizikistoj de la burĝa demokratio.*

*Se germana ŝtata prokuroro, carisma ĝendarmo aŭ "vere pola" Popoldemokrato defendas la "personan liberon" de strikrompantoj kaj ilin protektas kontraŭ la morala kaj materia premoj de la organiziĝintaj laboristoj, ni ne hezitas unu momenton esprimi nian solidaron kun ĉi-lastaj, pro tio ke ni opinias, ke ili havas la absolutan, moralan same kiel historian rajton, devigi siajn nekonsciajn konkurantojn al solidara sinteno, kvankam laŭ la vidpunkto de la formalisma liberalismo la "laboremuloj" sendube havas la rajton de la "libera individuo" agi tiel, kiel ilia prudento, respektive manko de prudento, ilin ordonas.*

*Se finfine la liberaluloj de la "manĉestra skolo" postulas, ke la salajra laboristo en sia batalo kontraŭ la kapitalo nome de la "burĝa libero" estu tute ne protektata, ni senmaskigas ĉi tiun metafizikan frazon, sub kiu sin kaŝas la plej kruela ekonomia ekspluatado kaj postulas senperan ŝtatan juran protekton por la klaso de la salajraj laboristoj, ignorante la formalan "egalecon por la leĝo".*

*La nacia problemo ne povas esti escepto inter ĉiuj politikaj, sociaj kaj moralaj problemoj, kiujn la moderna socialismo tiamaniere esploras kaj estas neeble solvi ĝin pere de iu nedifinita formulo, eĉ se ĝi sonas tiel bele kiel "la Rajto je Memdispono de ĉiuj Nacioj". Ĉar, aŭ ĉi tiu formulo nenion signifas kaj estas senenhava kaj al nenio deviganta frazo, aŭ ĝi celas, ke la socialistoj senkondiĉe ĉiam devus subteni ĉiujn naciajn aspirojn - kaj tiam ĝi estas simple falsa.*

*Jam el la ĝeneralaj principoj de la historia Materialismo sekvas, ke la vidpunkto de la socialistoj rilate la naciajn problemojn en ĉiu kazo antaŭ ĉio dependas de la konkretaj cirkonstancoj, kiuj estas sufiĉe diferencaj en la diversaj landoj kaj krome en la paso de la tempo ĉie grave povas ŝanĝiĝi..."*

Roza Luksemburg sekve donas ekzemplojn de tia sinteno al naciismaj strebadoj en la verkoj de Marks kaj Engels kaj daŭrigas :

*..."Kompreneble, se la socialistoj postulus ĝeneralan, tutmondan amnestian liberon por ĉiuj nuntempe subpremataj popoloj, tio estus multe pli grandanime kaj pli facile flatus la viglan fantazion de la junaj inteligentuloj. Sed tia inklino, disdoni al ĉiuj popoloj, landoj kaj grupoj kaj al ĉiu homa kreitaĵo la rajton je libero, egaleco kaj similaj feliĉigaj aferoj per unu rapida plumstreko, karakterizas ĝuste la junecan tempon de la socialisma movado, en la plej bona kazo la frazeologian fanfaronadon de la anarkistoj. La socialismo de la moderna laborista klaso, nome la scienca, ne ŝatas tiujn kiel eble plej radikalajn kaj noblajn solvojn por sociaj kaj naciaj problemoj. Ĝi antaŭ ĉio esploras iliajn realajn kondiĉojn.*

"Grandanimeco" de ĝiaj programaj solvoj ne karakterizas la socialdemokration kaj tiurilate ĝin ĉiam superas socialismaj partioj, kiuj ne estas ligitaj al "sciencaj doktrinoj" kaj tial senpene sorĉas la plej belajn donacojn por ĉiuj el iliaj vestaĵoj. Tiel ekzemple en Rusio la socialrevolucia Partio multe superas la socialdemokratojn rilate la agrarajn problemojn, ĉar ĝi disponas pri tre simpla recepto por la kamparanoj, parte tuj enkonduki la socialismon sur la kamparon, sen longa atendado de kondiĉoj en la industria produktado, kiuj ebligus tian revolucion. Kompare al tiaj partioj, la socialdemokratio estas malgrandanima partio kaj ankaŭ ĉiam restos tiel, same kiel Marks siatempe estis malgrandanima kompare al la grandanima kaj nobla Bakunin, aŭ kiel Marks kaj Engels kompare al la reprezentantoj de la "vera" aŭ "filozofia" socialismo. Sed la sekreto de la grandanimeco de ĉiuj socialistoj anarkistemaj kaj tiu de la malgrandanimeco de la socialdemokratio baziĝas sur tio, ke la anarkisma speco de revoluciuloj "mezuras la fortojn laŭ iliaj celoj kaj ne la celojn laŭ iliaj fortoj", ke ĝi direktas sian strebadon al tio, kion ĝia spekulativa kaj en la senfina spaco de la utopio spekulanta intelekto konsideras "bona" aŭ "necesa" por la savo de la homaro, dum la socialdemokratio kun siaj streboj staras firme sur historia fono kaj tial kalkulas kun historiaj ebloj. La marksisma socialismo i.a. diferenciĝas pro tio de ĉiuj aliaj "socialismoj", ke ĝi ne pretendas esti kapabla plenigi ĉiujn truojn kaŭzatajn de la historia evoluo.

Eĉ se ni, eĉ kiel Socialistoj, tuj rekonus la rajton je sendependeco de ĉiuj nacioj, tio fakte neniel ŝanĝus la faktan sorton de la nacioj. La "Rajto" de iu nacio je "libero", kiel la "Rajto" de iu laboristo je ekonomia sendependeco, sub la ekzistantaj sociaj kondiĉoj, en si mem estas same valoraj kiel tiu "rajto" de ĉiu homo manĝi el oraj teleroj, pri kio Nikolaj Ĉerniŝevskij jam skribis, ke li estas preta ĉiumomente vendi ĉi tion kontraŭ rubloj.

En la kvardekaj jaroj de la 19-a jarcento la proklamado de "Rajto je laboro" estis tre amata postulo ĉe la "utopiaj socialistoj" en Francio ; ĝi servis al tio, rapide kaj radikale solvi la socialan problemon. Sed ĉi tiu "Rajto" finiĝis dum la revolucio de 1848 post nur mallonga provo per terura fiasko, kiu eĉ ne tiam estus evitebla, se la t.n. famaj - fifamaj - "Naciaj Laborejoj" estus tute alimaniere organizitaj. La analizo de la realaj interrilatoj en la nuna socio, kiel Marks faris ĝin en sia **"Kapitalo"** devus konduki al la konvinko, ke, eĉ se oni sukcesus elpremi el la nuntempaj registaroj ĝeneralan "rajton" je laboro, ĉi-lasta restus belsona frazo kaj neniu el la sur la strato sidantaj plej malaltrangaj soldatoj el la industria armeo povus per ĉi tiu rajto plenigi nur la buŝojn de siaj malsataj infanoj.



Hodiaŭ la Socialdemokratio scias, ke ĉi tiu "rajto je laboro" nur tiam ĉesos esti senenhava belsona frazo, kiam la kapitalisma sistemo estos forŝovita, en kiu la kronika manko de laboro por certa parto de la industria proletaro estas necesa produktadkondiĉo. Sekve la socialdemokratio ne proklamas tian "rajton", ĝin ankaŭ ne postulas en la ekzistanta sistemo, sed preferas klopodi abolicii ĉi tiun sistemon per klasbatalo kaj nur fingre montras la ekzistadon de sindikatoj, asekuro kontraŭ senlaboreco, ktp., kiel provizorajn helpilojn.

Same la espero, solvi ĉiujn naciajn problemojn en la kadro de la kapitalismo, redonante aŭ certigante al ĉiuj nacioj, familioj kaj klanoj la eblecon al "Memdispono", estas tute utopia. Kaj ne pro tio, ke la ekstera proporcio de la fortoj inter la klasoj, sur politika tereno, fakte faras multajn punktojn el la politika programo de la socialdemokratio nerealigeblaj. Tiele, ekzemple, tre influhavaj voĉoj el la vicoj de la internacia laborista movado konvinke deklaris, ke la postulo, enkonduki ĝeneralan okhoran labortagon laŭ leĝa vojo, en burĝa socio ne havas ŝancon esti realigita, se oni konsideras kiel ĉiam pli kreskas la socia reakcio de la regantaj klasoj, la sociaj reformoj ĉie haltas, estiĝas potencaj unu-

igoj de la entreprenistaro, ktp. Spite tion, neniu
opinias, ke la postulo je okhora labortago estas uto-
pia, ĉar ĝi tute kongruas kun la progresanta evoluo
de ĉi tiu burĝa socio. Tuj redoni al ĉiuj gentoj aŭ
la tiel aŭ alie difinitaj "naciecoj" la eblon je fak-
ta "memdispono" estas ĝuste en la kadro de la histo-
ria evoluo de la nuna socio utopie. Ni ne volas di-
rekti nian atenton al ĉi tiu jam longe pasinta tempo,
kiam ĉe la komenco de la historio de la modernaj ŝta-
toj la naciecoj estis daŭre regrupigataj en tiun aŭ
alian grupon, unuiĝis, kunfandiĝis, denove disiĝis,
kontraŭbatalis unu la alian, estu kiel estu, fakto
estas, ke ĉiuj tiatempaj ŝtatoj sen escepto evoluis
al tute miksitaj produktoj rilate la naciecojn, sek-
ve de longa, de politikaj kaj gentaj revolucioj kom-
pletigita historio. Videblaj historiaj dokumentoj de
ĉi tiuj renversiĝoj estas tiuj multnombraj gentaj
restaĵoj, kiuj en ĉiu nuntempa ŝtato atestas pri la
ĉion uzurpanta antaŭeniro de la historia evoluo por
la tuta amaso da naciecoj. Marks konstatis jam sia-
tempe, ke ĉi tiuj naciaj splitgrupoj nun konvene po-
vas servi kiel apogojn de la kontraŭrevolucio, tiel
longe kiel revolucio aŭ mondmilito ilin ne forviŝas
kiel granda uragano.

"Ne ekzistas iu lando en Eŭropo", li skribis en
la "**Nova Rejna Gazeto**", "kiu en iu ajn angulo ne po-
sedas unu aŭ plurajn ruinojn de popoloj, restaĵon de
antaŭa loĝantaro, forpuŝita kaj submetita de la na-
cio, kiu poste fariĝis la portanto de la historia
evoluo. Ĉi tiuj restoj, de iu de la irado de la his-
torio senkompate paŝdetruata nacio, kiel Hegel diras,
ĉi tiuj popolrubaĵoj ĉiufoje fariĝos kaj restos ĝis
sia finfina tuta detruo aŭ sennaciigo, la fanatikaj
portantoj de la kontraŭrevolucio, same kiel ilia pro-
pra ekzistado fakte jam estas protesto kontraŭ gran-
da historia revolucio...

TTiel ekzemple la Gaeloj en Skotlando, kiuj apo-
gis la Stuart-anojn de 1640 ĝis 1875.

Tiel ekzemple en Francio la Bretonoj, kiuj apogis
la Burbon-anojn de 1792 ĝis 1800.

Tiel en Hispanio la Vaskoj, apogante Don Karlos.



Tiel en Aŭstrio (la aŭstria imperio de antaŭ 1914, Red.) la panslavismaj Sudslavoj, kiuj estas ne pli ol popolrubaĵoj de tre komplika miljara evoluo." (F. Engels : "**La Hungara batalo**").

En alia artikolo, kiu traktas la panslavismajn strebadojn al sendependeco de ĉiuj slavaj popoloj, Marks skribas : "La Germanoj kaj la Hungaroj perforte kunigis ĉiujn tiujn malgrandajn, senpovajn, kripligitajn nacietojn en unu grandan nacion, en la tempo, kiam fakte en Eŭropo la grandaj monarkioj estis fariĝintaj "historia neceso", kaj pro tio ebligis al ili partopreni historian evoluon, kiun ili neniam estus spertintaj, se ili estus restintaj sendependaj!... Nun la politika centralizo, sekve de la enormaj progresoj de la industrio, komerco, komunikado, fariĝis ankoraŭ pli urĝa neceso ol tiutempe en la 15-a kaj 16-a jarcentoj. Tio, kio ankoraŭ devas esti centralizata, centraliziĝas..."

Ni jam delonge ne plu samopinias kun Marks rilate la Sudslavojn, sed restas la ĝenerala fakto, ke la historia evoluo, precipe la moderna kapitalisma evoluo, ne tendencas al tio, redoni al ĉiu nacio ĝian sendependan ekzistadon, sed pli tendencas en la kontraŭa direkto kaj tion oni nun same rekonas kiel en la tempo de la "**Nova Rejna Gazeto**". Karl Kaŭcki skizas en sia ĵus aperinta disertacio "**Nacieco kaj internacieco**" jene la historian sorton de la nacioj : "Ni konstatis, ke la lingvo estas la plej grava instrumento en la sociaj rilatoj. Laŭmezure kiel ĉi tiuj rilatoj pliampleksiĝas dum la ekonomia evoluo, devas pliampleksiĝi ankaŭ la nombro de tiuj, kiuj parolas saman lingvon.

El tio rezultas tendenco de apartaj nacioj, sin plivastigi, absorbi aliajn naciojn, kiuj perdas sian lingvon kaj akceptas alian, ĉu tiun de la supera nacio, ĉu iun mikslingvon."

– Laŭ Kaŭcki disvolviĝis samtempe tri grandaj kulturaj komunoj de la homaro : la kristana, islama kaj budhisma. – "Sed ĉiu el tiuj kulturrondoj enhavas multajn lingvojn kaj naciojn. En ĉiu opa la plejpar-

*to de la kulturo ne estas nacia, sed internacia. La tutmondaj rilatoj tamen havas ankoraŭ pli vastan efikon. Ili pli kaj pli disvastiĝas kaj ĉie zorgas pri la ekregado de la kapitalisma produktadmaniero ; ... Tie, kie ekzistas pli longe daŭranta intima kontakto de trafiko kaj kulturo inter diversaj popoloj, tie unu aŭ kelkaj nacioj baldaŭ superregos la aliajn pro pli altnivelaj ekonomio, scienco aŭ arto. Iliaj lingvoj fariĝos tiaj, kiajn ĉiu komercisto kaj ĉiu klerulo devas scipovi ; ilia kulturo - ekonomio, arto, literaturo - determinas la karakteron de la tuta kultura komuno. Tian rolon havas en la antikvaj tempoj en la landoj ĉirkaŭ la Mediteranea maro la greka kaj latina lingvoj.*

*En la islama mondo ĝin ludis la araba lingvo ; en la kristana kulturrondo - kiu kompreneble ampleksas ankaŭ judojn kaj ateistojn - la germana, angla, franca lingvoj fariĝis tutmondaj lingvoj. -- Eblas, ke la ekonomia kaj politika evoluo ankoraŭ aldonos kvaran lingvon kiel tutmondan lingvon, nome la rusan. Sed estas egale eble, ke unu el ili, la angla lingvo, fariĝos la nura tutmonda lingvo... En la formo de ekesto de universalaj lingvoj de la komercistoj kaj kleruloj okazas la kuniĝo de nacioj en internaciaj kulturkomunoj. Kaj neniam antaŭe ĉi tiu kuniĝo estis pli fortika ol nun, neniam nacia kulturo estis tiom neebla. Kaj ŝajnas al mi strange, se Otto Bauer ĉiam parolas nur pri la nacia kulturo, konsideras celo de la socialismo, ke la popolamaso alpropriĝu al si la nacian kulturon... Se la socialisma socio faros klerulojn el la popolamasoj, ĝi al ili donos ankaŭ la eblon ekregi plurajn lingvojn, tutmondajn lingvojn kaj tiel havigi al si la tutan internacian kulturon de nia kulturrondo, ne nur la specialan kulturon de iu aparta nacia lingvokomuno. Kiam iam la amaso de la popolo de niaj kulturŝtatoj krom la nacia lingvo regos ankaŭ unu aŭ plurajn universalajn lingvojn, la bazo estos fondita por la iom-post-ioma regreso kaj tuta malapero, unue de la lingvoj de la malgrandaj nacioj ; por la finfina kuniĝo de la tuta homaro en unu lingvo kaj unu nacio, kiel la popoloj de la orientaj mediteraneaj landoj post la tempo de Aleksandro de Makedonio estis kunigitaj en la Helenismo, dum tiuj el la okcidentaj partoj kunfandiĝis pli poste en unu romia nacieco.*

*La diverseco de la lingvoj en nia kulturrondo malfaciligas la interkomprenon de la membroj de la diversaj nacioj, fariĝas malhelpo por ilia kultura progreso. Sed nur la socialismo povos forigi tiun malhelpon, kaj ĝi devos longe efiki, antaŭ ol sukcesi tiom altnivele eduki la popolamasojn, ke ĝi atingos konkretajn progresojn. Jam nun tamen ni devas konscii pri tio, ke* ***nia internacieco ne estas iu speciala formo de naciismo****, kiu diferencas de la burĝa tipo nur pro tio, ke ĝi ne estus agresema, kiel ĉilasta, sed lasus al ĉiu nacio la saman rajton, kiun ĝi postulas por si mem kaj rekonus la plenan suverenecon de ĉiu nacio. Ĉi tiu koncepto, kiu transponas la vidpunkton de la anarkismo de la individuoj al la nacioj, ne akordas kun la intima kulturkomuneco, ekzistanta inter la nacioj de la moderna kulturo. Ĉi tiuj efektive formas kaj ekonomie kaj kulture unusolan socian korpon, kies florado baziĝas sur harmonia kunlaboro de ĝiaj partoj, kio estas atingebla nur se ĉiu parto submetiĝas al la tuto.* ***La socialisma internacio ne formas konglomeraton el suverenaj nacioj, el kiuj ĉiu povas fari kion ĝi ŝatus, kondiĉe ke ĝi ne ekkonfliktas kontraŭ la egalrajteco de la aliaj, sed kontraŭe, organismon, kiu des pli perfekte funkcias, ju pli bone ĝiaj partoj interkomprenas kaj ju pli unuanime ili agas laŭ komuna plano."***

*(Fino de la citaĵo de Kaŭcki, Red.)*

*Tiel aspektas la historia skemo, kiun Kaŭcki kreis. Kvankam li alrigardas la aferon el alia vidpunkto ol Marks : li emfazas ĉefe la kulturan, pacan flankon de la disvolviĝo, dum Marks emfazas la politikan flankon, kies eksteren direktita armilo estas la uzurpo. Ambaŭ tamen priskribas la sorton de la nacioj en la historia evoluo ne laŭ tio, ke ili dezirus apartiĝi kaj sendependiĝi, sed ĝuste inverse. Kaŭcki montras - laŭ nia scio por la unua fojo en la*

socialisma literaturo de nia tempo - tuj la historian tendencon, kiu direktas tien, tute forigi la naciajn diferencojn en la socia sistemo kaj kunfandigi la civilizitan homaron en unu nacion.

Estas vere, rimarkas la sama teoriulo, ke la kapitalisma disvolviĝo ankaŭ nun samtempe montras fenomenojn, kiuj ŝajne estas kontraŭaj : la leviĝo kaj la plifortiĝo de la nacia konscio, kiel la deziro al naciŝtato kiel "la al la modernaj cirkonstancoj plej konforma formo de ŝtato, tiu, en kiu ĉiu povas plej facile plenumi sian taskojn". Sed tiu ĉi "plej konforma" naciŝtato estas nur abstraktaĵo, kiu teorie estas bone disvolvebla kaj defendebla, sed ne akordas kun la realo. La historia evoluo al civilizita, ĉiujn homojn ampleksanta komuno, progresas kiel la tuta socia evoluo, esence meze de kontraŭdiroj, sed ĉi tiu kontraŭdiro rilate la unuigan kreskon de la internacia civilizo ne troviĝas tie, kie Kaŭcki ĝin serĉas, ne en la tendenco al iu idealo de "naciŝtato", sed prefere tie, kie Marks montras ĝin : en la murdaj bataloj inter la nacioj, en la tendenco konstrui grandajn kapitalismajn ŝtatojn ekster kaj kontraŭ grandaj influsferoj de la civilizo.

La evoluo al grandaj ŝtatoj, kiu formas okulfrapan karakteron de la moderna epoko kaj kiu ĉiam pli graviĝas pro la progresoj de la kapitalismo, jam antaŭe kondamnas la tutan aron de malgrandaj nacioj kaj nacietoj al politika malforteco. Krom kelkaj tre potencaj nacioj, kiuj determinas la kapitalisman evoluadon, pro tio ke ili disponas pri la materiaj kaj la necesaj mensaj rimedoj por konservi sian ekonomian kaj politikan sendependecon, la "memdispono", la sendependa ekzistado de la malgrandaj kaj la plej malgrandaj nacioj estas iluzia kaj ĉiam pli fariĝas tia. La reiro al sendependa ekzistado de ĉiuj aŭ de la plejparto almenaŭ de la nun subpremataj nacioj estus nur tiagrade ebla, kiel la ekzistado de malgrandaj nacioj en la kapitalisma epoko havus realajn ŝancojn en la estonto. Provizore, la ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj en la kadro de la granda ŝtato estas tiom ne malhaveblaj en la batalo por la ekzistado de la kapitalismaj nacioj, ke ankaŭ la politike sendependaj, formale egalrajtigitaj malgrandaj nacioj, kiuj ekzistas en Eŭropo, ludas en la politika vivo de Eŭropo nur statistan rolon, plejofte tamen tiun de la propeka kapro. Ĉu vere oni povas serioze paroli pri "Memdispono" ĉe la formale sendependaj Montenegranoj, Bulgaroj, Rumanoj, Serboj, Grekoj, certagrade eĉ ĉe la Svisoj, kies sendependeco estas mem produkto de politikaj bataloj kaj de diplomatludado en la "Eŭropa koncerto" ? (Red. : la broŝuro estis verkita en 1908). Laŭ ĉi tiu vidpunkto la ideo certigi al ĉiuj "nacioj" la eblon de mem-dispono, similas la perspektivon retroiri de la grandŝtata evoluo al la mezepokaj malgrandaj ŝtatoj, al tempo eĉ antaŭ la dekkvina kaj deksesa jarcentoj.



La dua baza karaktero de la nuntempa evoluo, kiu laŭ la alia vidpunkto kondamnas ĉi tiun ideon kiel utopion, estas la kapitalisma **imperiismo**. La ekzemploj de Anglio kaj Holando montras, ke kapitalisma lando eĉ, sub certaj kondiĉoj povas preterlasi la transiran stadion de "naciŝtato" kaj ankoraŭ en la epoko de la manufakturo povas fondi kolonian ŝtaton. Ĉi tiun ekzemplon de Anglio kaj Holando, kiuj jam komence de la deksepa jarcento ekkonkeris koloniojn, sekvis ĉiuj grandkapitalismaj ŝtatoj en la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj. La frukto de ĉi tiu tendenco estas la senĉesa ruiniĝo de ĉiam pli da landoj kaj popoloj, de tutaj kontinentoj.

Ĝuste ĉi tiu evoluo de la mondkomerco en la kapitalisma epoko kaŭzas la ruiniĝon neeviteblan, kvankam iom-post-ioman, de ĉiuj pli primitivaj socioj, detruas ilian historie kreskintan specon de "memdispono", faras ilin dependaj de la ĉion detruanta rado de la kapitalisma evoluo kaj de la mondpolitiko. La perturban efikon de la mondkomerco sekvas la aneksado aŭ la politika dependeco de la kolonioj en diversaj gradoj kaj formoj.

Kaj se la Socialdemokratio energie principe kaj en ĉiuj ĝiaj simptomoj kontraŭbatalas la kolonian

politikon kaj klopodas emfaze malhelpi ĝiajn novajn progresojn, ĝi samtempe klare vidas, ke ĉi tiu disvolviĝo kaj ankaŭ la ekesto de la kolonia politiko, profunde radikas en la bazoj de la kapitalisma produktado, ke ĝi ĉiam akompanos la pluan progreson de la kapitalismo, kaj ke nur naivaj burĝaj "pacapostoloj" povas kredi je iu deturno de la nunaj ŝtatoj de ĉi tiu vojo. Vidalvide al la disvolviĝo kaj la neceso de batalo por vivteno sur la internacia merkato, al la mondpolitiko kaj al la koloniaj posedaĵoj por la grandaj kapitalismaj ŝtatoj, ne la "naciŝtato" - kiel Kaŭcki opinias - "estas la plej bone konformigita al la taskoj kaj la nunaj kondiĉoj", t.e. la bezonoj de la kapitalisma eksplu- atado, sed la konkera ŝtato. Kaj komparante diversajn gradojn de alproksimiĝo al tiu t.n. idealo, oni konstatas, ke ekzemple ne la Franca ŝtato plej bone konformiĝas al ĉi tiuj taskoj, kiuj almenaŭ en ĝia Eŭropa parto estas nacia unueco, kaj ankoraŭ malpli la Hispana ŝtato, kiu ŝanĝiĝis de imperiisma ŝtato preskaŭ tute en "naciŝtaton", post kiam ĝi estis senigita de siaj kolonioj, sed tiuj ŝtatoj, kiuj en Eŭropo kaj ĉie alie en la mondo apogas sin sur nacia subpremado, kiel la angla kaj la germana, la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko, kiuj en la sino havas la pusantan vundon de la subpremado kontraŭ la nigrahaŭtuloj kaj kiuj konkeras la aziajn popolojn...

Konsekvence, ankaŭ la historio de la kolonia ekspansio de la kapitalismo denove produktas la iom kontraŭan tendencon ĉe la kolonioj, sin sendependigi unue ekonomie kaj poste ankaŭ politike. Bonege ilustras tion la historio pri la liberiĝo de Norda Ameriko el Anglio fine de la dekoka jarcento, de Suda Ameriko el Hispanio kaj Portugalio en la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la antaŭa jarcento kaj same la sukcesaj alstreboj de la Aŭstralianoj al aŭtonomio disde Anglio. Tamen pli profunda ekzameno de ĉi tiuj tendencoj tuj montras la alispecajn kondiĉojn de ilia estiĝo. Norda kiel Suda Ameriko estis ĝis la deknaŭa jarcento viktimoj de ankoraŭ originala sistemo de kolonia politiko, kiu baziĝis pli sur rabado al la lando kaj al ĝiaj naturaj riĉaĵoj favore al la ŝtata kapitalo de la eŭropaj landoj, ol sur racia ekspluatado favore al la kapitalisma produktado.



Temas ĉi tie pri tutaj kontinentoj, kiuj posedis ĉiujn kondiĉojn por memstara kapitalisma disvolviĝo, kaj ĉi tiu devis malbari sian vojon, forigante la facile rompeblajn katenojn de politika dependeco. Dum, en Nord-Ameriko, kiu dependis de Anglio, tiu kapitalisma premo havis pli grandajn efikojn, Sud-Ameriko, kiu ĝis tiam estis plejparte agrara, renkontis multe malpli da rezisto flanke de la ekonomie postrestintaj Hispanio kaj Portugalio. Kompreneble, tia eksterordinara riĉeco je naturaj kondiĉoj ne estas kutimo en ĉiuj aliaj kolonioj. Aliflanke, la moderna sistemo de koloniigo kreas dependecon, kiu estas multe malpli supraĵa ol la antaŭa. Sed la de la Amerikaj kolonioj konkerita sendependeco neniel forigis la nacian dependecon en ili mem, ĝi estis nur ŝovita al aliaj nacioj, nur la portanto ŝanĝiĝis. En la Unuiĝintaj Ŝtatoj ne estis fremda popolo, kiu sub la angla regado laborante leviĝis, estis ja la samaj anglaj elmigrintoj, kiuj ekloĝis sur la detruata kulturo kaj la kadavroj de la aŭtoktonaj Indianoj, - la afero estas tute sama en la Aŭstraliaj kolonioj de Anglio, kie la Angloj formas 90-procente la loĝantaron - kaj nuntempe la Unuiĝintaj Ŝtatoj estas unu el la plej fortikaj centroj de imperiisma subpremado. (Red. : Jam en 1908!)

Same la situacio en Brazilo, Argentinio kaj aliaj antaŭaj kolonioj, en kiuj la elmigrintoj - Portugaloj kaj Hispanoj - konsistigas la ĉefan elementon : ili akaparis la sendependecon de la eŭropaj ŝtatoj antaŭ ĉio kun la celoj sendepende komerci kun la negroj, ekspluatadi ilin sur la plantejoj kaj disvastigi la konkeradon al ĉiuj apudaj, pli malfortaj kolonioj...

Ĉi tiuj ŝajnaj esceptoj ĉe pli profunda analizo do nur konfirmas la konkludon, kiom malmulte la moderna kapitalismo estas harmoniigebla kun vera strebo al sendependeco de ĉiuj nacioj.

Estas vere, ke oni povas multe pli facile "kapti" la problemon, tute disigante la problemon pri koloniaj aneksadoj de la problemo pri naciecoj. Tiel ekzemple estas la sinteno, kiun la defendantoj de la "Naciaj Rajtoj" ofte konscie aŭ subkonscie montras kaj kiu akordas ankaŭ kun la koncepto pri kolonia politiko, kiun ekzemple Eduard David en la Germana kaj van Kol en la Nederlanda Socialdemokratio havas, nome, konsideri la koloniajn aneksadojn kiel la rezulton de la civiliza misio de la eŭropaj landoj, kiel nepre necese eĉ en iu socialisma sistemo. Ĉi tiun koncepton ni povas tuj klarigi kiel "eŭropan" aplikon de la filozofia principo de Fichte en la fama frazo de Ludwig Boernes : "MI estas MI. - Tio, kio troviĝas ekster MI, estas vivrimedoj".

Se oni rekonas nur la Eŭropajn popolojn kiel verajn naciojn, la koloniajn popolojn kontraŭe kiel "vivrimedojn", oni povas paroli pri "Naciŝtatoj" en Eŭropo en ĉi tiu kazo kaj rigardi tiel ekzemple Francion, Danion aŭ Italion, oni povas ankaŭ limigi la problemon naciecan al la eŭropaj komplikaĵoj. Sed en tiu kazo la "Memdisponrajto de la nacioj" fariĝas teorio de la regantaj rasoj kaj klare montras sian originalan devenon de la ideologio de la burĝa liberalismo, kun ĝia "eŭropa" kretenismo. Laŭ la socialisma interpretado, ĉi tiu rajto nature devas havi tutmondan karakteron, kaj ekkonscii pri tio sufiĉas por montri, ke la espero, realigi ĉi tiun "rajton" sur la bazo de ĉi tiu ekzistanta sistemo, estas utopio, kiu rekte kontraŭas la tendencon en la kapitalisma disvolviĝo, sur kiu la Socialdemokratio bazis sian ekzistadon, ĉar la ĝenerala reiro al la celo, disbati ĉiujn ekzistantajn ŝtatojn en naciajn unuojn kaj ilin dislimigi unu de la alia laŭ la modelo de naciaj ŝtatoj kaj ŝtatetoj, estas tute senespera kaj historie reakcia aŭdaca entrepreno."

***



Ke la formulo pri "la Rajto de la Nacioj" tute kontraŭas la teorion de la moderna socialismo, la teorion de la klasa socio, Roza Luksemburg jene montras :

... "En la klasa socio ne ekzistas iu nacio kiel homogena tuto, kontraŭe en ĉiu nacio ekzistas klasoj kun antagonismaj interesoj kaj "Rajtoj". Vere, ne ekzistas iu socia tereno de la plej krudaj materiaj rilatoj ĝis la plej subtilaj moralaj, en kiu la posedantaj klasoj kaj la konscia proletaro montrus la saman sintenon, en kiu ili montrus sin kiel nedistingeblan "popolon". Sur la tereno de la ekonomiaj rilatoj la burĝaj klasoj reprezentas ĉiufoje la interesojn de la eksplutado, la proletaro la interesojn de la laboro. Sur la tereno de la juraj rilatoj la privata posedo estas la bazangula ŝtono de la burĝa socio, la interesoj de la proletaro postulas la emancipiĝon de la senhavuloj el la regado de la privata posedo. Sur la tereno de la juĝado la burĝa socio reprezentas la klasan "justecon", la justecon de la sataj kaj regantaj homoj, la proletaro defendas la humanecon kaj la principon, kunkonsideri sociajn influojn sur la individuo. En la internaciaj rilatoj la burĝaro apogas politikon de milito kaj aneksado, en la nuna stadio de la sistemo impostpolitikon kaj komercmiliton, la proletaro politikon de ĝenerala paco kaj libera komerco. Sur la tereno de la sociologio kaj de la filozofio la burĝaj skoloj kaj la skolo, kiu reprezentas la vidpunkton de la proletaro, akre kontrastas unu kun la alia. Idealismo, Metafiziko, Mistikismo, Eklektikismo estas reprezentaj por la posedantaj klasoj kaj iliaj mondkonceptoj, la hodiaŭa proletaro havas sian skolon, la dialektikan Materialismon. Eĉ sur la tereno de la t.n. ĝenerale homaj rilatoj, la etiko, la ideoj pri arto, edukado, interesoj, mondkoncepto kaj idealoj troviĝas granda abismo inter la burĝaro kaj la konscia proletaro. Tie, kie la formalaj strebadoj kaj interesoj de la proletaro kaj de la burĝaro tute aŭ en ilia progresema parto ŝajnas identaj aŭ komunaj, kiel ekzemple ĉe la demokrataj strebadoj, tie kaŝas sin sub la

*identeco de la formoj kaj sloganoj absoluta malkongrueco rilate enhavon kaj efektivan politikon.*

*En socio tiel strukturita oni ne povas paroli pri iu kolektiva kaj unuanima volo, pri "Memdispono" de la "Nacio". Kiam ni en la historio de la novtempaj socioj renkontas "naciajn" movadojn kaj batalojn por "naciaj interesoj", tiuj normale estas klasaj movadoj de la reganta burĝa tavolo, kiu en certa kazo certagrade povas reprezenti ankaŭ aliajn popoltavolojn, kaj nome en tiu grado, en kiu ĝi en la figuro de "naciaj interesoj" ŝirmas progresemajn formojn de la historia evoluo kaj laŭgrade ke la laboranta klaso ankoraŭ ne kristaliĝis el la amaso de la burĝaro gvidata "Popolo" kiel memstara konscia politika klaso..."...*

Sekvas ekzemploj pri tiuj naciaj revolucioj, en kiuj la proletaro jes aŭ ne partoprenis kiel memstara konscia politika klaso. Poste R.L. rimarkigas :

*... "La Socialdemokratio estas la klasa partio de la proletaro. Ĝia historia tasko estas reprezenti la klasajn interesojn de la proletaro kaj samtempe la interesojn de la revolucia disvolviĝo en la kapitalisma socio en la direkto de realigo de la socialismo. La socialdemokratio tial havas kiel nepre necesan taskon, ne realigi la rajton je Memdispono de la nacioj, sed nur la rajton je Memdispono de la laboranta klaso, de la ekspluatata kaj subpremata klaso - de la proletaro. Laŭ ĉi tiu vidpunkto ĝi formulas siajn programajn postulojn. Nek pri problemoj de politikaj formoj, kiujn ni postulas en la ŝtato, nek pri problemoj de la interna aŭ ekstera politiko de la ŝtato, nek pri problemoj de juĝado aŭ de la instruaferoj, de la impostoj aŭ de la militaparato, la Socialdemokratio lasas al la "Popolo" la decidon laŭ ĝia bontrovo kaj "Memdispono". Sed la kondiĉoj de la nacipolitika kaj nacikultura ekzistado ĝuste tiom apartenas al la tereno de la klasaj interesoj kiel la menciita problemaro ; inter ĉi tiuj problemoj kaj la nacipolitikaj kaj -kulturaj kondiĉoj ordinare ekzistas tre intima interligo de reciproka dependeco kaj determinateco. Sekve, la Socialdemokratio ankaŭ ĉi tie ne povas preteriri la devigon, ĉiufoje denove formuli siajn postulojn kaj esprimi la fortan deziron je formoj por aktiva nacipolitika kaj kultura vivo, kiuj plej bone kongruas kaj kun la interesoj de la proletaro kaj ĝia batalo en certa lando kaj en certa tempo kaj kun la interesoj de la revolucia socia disvolviĝo ; sed al la "Popolo" la Socialdemokratio ne lasas la decidon pri ĉi tiu afero. Tio fariĝos tute klara al ni, se ni malsuprenigas la problemon el la nuboj de la abstrakta pensado sur la fonon de la konkretaj cirkonstancoj.*



*La "Popolo" devus havi la "rajton" je memdispono. Sed kiu estas la "popolo", kiu estas la potenculo, kiu havas la "rajton" esti la elektita reprezentanto de la "popolo" kaj ĝia volo ? Kiel oni rekonas tion, kion la "popolo" vere volas ? Ĉu ekzistas iu politika partio, kiu ne pretendus ja, ke ĝuste ĝi, kontraŭe al ĉiuj aliaj, estas la vera reprezentanto de la "popola volo", dum ĉiuj aliaj esprimas nur la modifitan, falsitan popolan volon ? Ĉiuj burĝaj - liberalaj partioj evidente opinias, ke ili estas la enkorpiĝinta volo de la popolo, ili postulas la ekskluzivan monopolon reprezenti la "popolon". Sed la konservativaj kaj reakciaj partioj ne malpli apogas sin sur la volo kaj la interesoj de la popolo kaj certagrade ne malpli prave. La granda Franca Revolucio estis sendube esprimo de la franca popola volo, sed Napoleono, kiu per la puĉo de la 18-a de brumero forviŝis la laboron de la revolucio, laŭlitere faris la principon "la volonté générale" (ĝenerala volesprimo) la bazo de sia tuta ŝtatreformo.*

*En 1848, la "popola volo" unue elektis la respublikon kaj la provizoran registaron, poste la nacian reprezentantaron kaj fine Louis Bonaparte, kiu malfondis kaj la respublikon kaj la provizoran registaron kaj la nacian reprezentantaron. Dum la revolucio en Rusio (tiu de 1905, Red.), la liberalismo postulis nome de la popolo la "Kadetan ministrejon", la*

*absolutismo organizis nome de la sama popolo pogromojn, kaj la revoluciaj kamparanoj esprimis sian popolan volon, bruligante la kortegojn de la nobelaro. En Polio luis la popolan volon la partio de la ultradekstruloj, kaj la "Nacidemokratoj", kiuj instigis la "naciajn" laboristojn kaŝmurdi la socialismajn laboristojn.*

*La "vera" volo de la "Popolo" havas la saman sorton kiel la vera ringo de la parabolo en "Nathan, la saĝulo" de Lessing : ĝi malaperis, kaj ŝajnas preskaŭ neeble retrovi ĝin kaj distingi ĝin de falsaĵoj kaj imitaĵoj. Ŝajne la demokrata principo donas metodon por malkovri la veran volon de la popolo, konstatante la opinion de la Plimulto.*

*Popolo volas, kion la plimulto de la popolo volas. Sed, ho ve, tiu Socialdemokrata partio, kiu iam rekonus tiun principon kiel gvidlinion : tio egalus mortkondamnon de ĉi tiu sama socialdemokrata partio kiel revolucia partio. La socialdemokratio estas laŭ sia naturo partio, kiu reprezentas la interesojn de la granda plimulto de la popolo. Tamen ĝi, rilate la esprimon de la konscia volo estas en la burĝa socio provizore partio de la malplimulto kaj strebas nur al tio : fariĝi plimulto. Sed ne per tio, ke ĝi en siaj strebadoj, sia politiko, sia programo, spegulas la volon de la plimulto de la popolo, sed kontraŭe per tio, ke ĝi reprezentas la konscian volon, absolute ne de la tuta popolo, sed de la proleta klaso. Kaj sur la tereno de ĉi tiu klaso eĉ la Socialdemokratio ne havas la intencon reprezenti la volon de la plimulto, sed ĝi reprezentas la volon kaj la konscion de la plej konscia, plej revolucia tavolo de la grandurba industriproletaro ; tamen ĝi klopodas disvastigi tiun volon kaj enpenetrigi ĝin en la plimulton de la laboranta popolo, konsciigante ĝin unue pri ĝiaj propraj interesoj. La "volo de la popolo", aŭ de ĝia plimulto, estas sekve por la Socialdemokratio tute ne idolo, antaŭ kiu ĝi humile genufleksas; kontraŭe, la tuta historia misio de la Socialdemokratio baziĝas antaŭ ĉio sur la revoluciigo, sur la formado de la "popola volo", t.e. de ĝia laboranta plimulto. Sed la tradiciaj formoj de la konscio, kiel ilin montras la plimulto de la popolo kaj do ankoraŭ la laboristaj klasoj en la burĝa socio, kutime estas formoj de burĝa konscio, malamikaj al la idealoj kaj strebadoj de la socialismo."...*



Roza Luksemburg sekve ĝisfunde priparolas proponon de membro de la Rusa Socialdemokrata Partio surbaze de la 9-a punkto en la programo de tiu partio pri la "rajto je memdispono de la nacioj" ; ŝi montras, ke la propono estas netaŭga por solvi la naciajn problemojn, ekzemple de la Poloj, kaj finas sian tekston per jenaj vortoj :

... *"Persisti je la metafizika frazo en la programo de la Socialdemokrata Laborista Partio de Rusio estus malfidelo al tiu ekzakta klasa vidpunkto, kiun la partio volas esprimi en ĉiuj detaloj de la programo. La naŭa paragrafo devas esti anstataŭata de konkreta, sed tamen sufiĉe ĝenerala formulo, kiu permesos la solvon de la naciecaj problemoj konforme al la interesoj de la proletaro de la apartaj nacioj. Tio ne signifas, ke la programo de la socialdemokrata organizo de la koncernaj nacioj sendiskute devus esti enŝovata en la programon de la tutŝtata partio. La plej profunda, kritika ekzameno de ĉiu el tiuj programoj far la tuto de la laborista partio en la ŝtato estas nepre necesa, ĉiukaze ĉi tiu ekzameno devas eliri el la efektivaj sociaj cirkonstancoj, el la scienca analizo de ĝeneralaj tendencoj de la kapitalisma evoluo kiel el la interesoj de la klasbatalo de la proletaro, kiuj povas konduki nur al la unuanima kaj konsekvenca vidpunkto de la partio en ĝia tuto kaj ĝiaj koheraj partoj"...*

Fino.

Kompil-tradukis K-do 31656.

# IMPERIISMO, NACIISMO

# kaj

# SOCIALISMO

Noto de SAT-Broŝurservo :

Tiu ĉi artikolo de Roza Luksemburg aperis fruntpaĝe de **Sennacieca Revuo**, 10.3.1933, kun jena enkonduko de **E. Lanti** :

"Ni tute speciale altiras la atenton de la legantoj al ĉi tiu artikolo de Roza Luksemburg. Ne nur tial, ke la temo estas interesa kaj pripensinda, sed ĉefe pro la fakto, ke tiu plej certa revolucia heroino defendas vidpunkton, kiu apogas la tezojn de la sennaciistoj.

Unu el la pretekstoj, kiujn elmetis la skismigintoj de nia movado estas, ke SAT havas **oficialan** ideologion, la sennaciismon, kiu estas malkonforma al tiu de la laboristaj partioj. Estas evidenta mensogo por ĉiu informita persono, ĉar nenie en la Statuto estas eĉ parolite pri sennaciismo.

Tial ke estas vere tro facile vidigi la mensogon, kelkiuj, pli ruzaj, sed ne pli honestaj, ne asertas, ke la sennaciismo estas oficialaĵo en SAT, sed ke tiu tendenco ne devas havi lokon en proleta organizo, pro sia kontraŭ-revolucieca rilato al la imperiismo. Verdire tiu fiaserto iom efikis sur kelkajn K-dojn. Ili facilanime kredis, ke la Direkcio forlasis la revolucian vidpunkton kaj perfidas la interesojn de l' Proletaro, permesante, ke la sennaciisma tendenco havu ekzisto-rajton en SAT. Verŝajne tiuj trompitoj ne tiom facile kredos, ke Roza Luksemburg estas perfidino, renegatino, kvankam ŝi ankaŭ, kiel la sennaciistoj, malrekomendas la batalon por naciliberigo.

Neniam la sennaciistoj postulis, ke ilia vidpunkto fariĝu la ortodoksaĵo en SAT ; ili nur pretendas al la samaj rajtoj kiel la internaciistoj. Se tiel eminenta teoriino, tiel aŭtentika revoluciino kiel R.L. povis aparteni al laborista partio, kvankam ŝi subtenis vidpunkton, kiu apogas la sennaciismon, ŝajnas al ni, ke tio plej bone pruvas, ke la pretendo de la sennaciistoj estas tute pravigita.

E.L.



* * *

*Ke la milita malvenko transformiĝis en Rusio en disrompiĝon kaj detruiĝadon ĝeneralan, pri tio la bolŝevikoj respondecas parte. Sed ili mem pligravigis en larĝa skalo la objektivajn malfacilojn de la situacio per agitvorto, kiun ili starigis plej antaŭen en sia politiko : "la rajto de l' nacioj je libera memdifino", aŭ pli precize, tio, kio kaŝiĝas reale sub tiu ĉi frazo : la ŝtata disfalo de Rusio. La formulo pri la rajto de l' diversaj naciecoj de l' rusa imperio memdifini pri siaj destinoj "ĝis inkluzive la rajto konsistigi ŝtaton apartigitan de Rusio" estas proklamita kun doktrineca persistemo nelacigebla de Lenin kaj liaj amikoj, kiuj faris el tio sian opozician krion en la batalo kontraŭ la imperiismo de Miljukof, poste kontraŭ tiu de Kerenski. Ĝi formis la akson de ilia interna politiko post la Oktobra revolucio, kaj ĝi formis la tutan starpunkton de l' bolŝevikoj en Brest-Litovsk, kiel la sola armilo, kiun ili trovis por kontraŭmeti al la venkintopozicio de l' germana imperiismo.*

*Tio, kio frapas unuavide ĉe la persistado kaj la rigida konsekvenco, kun kiu Lenin kaj K-io alkroĉiĝis al tiu ĉi agitvorto, estas la tute evidenta kontraŭdiro kiun ĝenerale la bolŝevikoj elmontras, kiel ankaŭ kun ilia pozicio kontraŭ la aliaj demokrataj principoj. Unuparte ili manifestis malvarman estimon, ne nur por la konstituciiga kunveno kaj la universala voĉdono, sed plie por la libero de gazetaro kaj kunvenado, unuvorte por la tuta aparato de demokrataj liberoj de la popolamasoj, kiuj konsistigis en sia tuto la "rajton de memdispono" en Rusio. Aliparte, ili traktis la rajton pri nacia memdispono kiel juvelon de la demokrata politiko, antaŭ kies*

*brilo devus malaperi ĉiuj praktikaj fundamentoj de la reala kritiko.*

*Ili neniel estis impresataj per la rezultoj de l' referendumo por la Konstituciiga kunveno en Rusio, voĉdono, kiu tamen okazis sur la plej demokrata bazo tiam konata en la mondo, kaj en la plena libero de popola respubliko. Ili deklaris pro tre raciaj, kritikaj konsideroj tiujn rezultojn nulaj kaj neekzistantaj. Kontraŭe, ili defendis en Brest la "referendumon" de la alirasaj nacioj en Rusio pri ilia ŝtata aparteneco, kiel la veran talismanon de ĉiu libero kaj de ĉiu demokratio. Ili rekonas en ĝi la plej puran kvintesencon de la volo de l' popoloj, kaj la plej altan instancon en la demandoj pri la politika destino de l' nacioj.*

*La abismo de kontraŭdiroj, kiu malfermiĝas tie, estas tiom pli nekomprenebla, ke en la demokratiaj formoj de la politika vivo en ĉiu lando temas efektive pri tre multvaloraj, se ne nepraj bazoj de la socialista politiko, dum la fama "rajto pri libera memdifino de l' nacioj" estas nur etburĝa frazo, simpla stultaĵo.*

*Fakte, kion signifas tiu ĉi rajto ? La aboco de l' socialista politiko estas sin konfesi malamiko al ĉiu formo de subpremado, eĉ tiu de unu nacio fare de alia.*

*Se malgraŭ ĉio politikuloj tiel malvarmpensaj kaj tiel plenaj de kritika spirito kiel Lenin kaj Trocki, bolŝevikoj, kiuj havas nur ŝultro-eklevojn ironiajn por ĉiuj specoj de la utopia frazaro, tiaj kiaj malarmado, Ligo de Nacioj, ktp... prenis ĝuste kiel manian agitvorton ĉi-foje malplenan frazon el tute la sama kategorio, ili devis trovi en tio, ŝajnas, iun politikan oportunon. Lenin kaj liaj K-doj kalkulis verŝajne, ke ne ekzistus rimedo pli certa por enĉenigi la multnombrajn naciecojn alirasajn en la rusa imperio al la afero de l' revolucio, al tiu de l' socialista proletaro, ol doni al ili, en la nomo de l' revolucio kaj de l' socialismo, ekstreman kaj senliman liberon memdisponi pri sia sorto. Ekzistis*



*tie ia afero analoga al la politiko de l' bolŝevikoj rilate la rusajn kamparanojn, kies deziro por grundo estis kontentigata per la agitvorto de la rekta forpreno de l' feŭdaj teroj, kaj kiuj, per tio, devis esti ligataj al la standardo de l' revolucio kaj de l' proleta registaro. En ambaŭ kazoj, malfeliĉe, la kalkulo estis tute erara. Dum Lenin kaj K-io evidente atendis, kiel defendantoj de la nacia libero, eĉ "ĝis la ŝtata apartiĝo", fari el Finlando, el Ukrainio, Polio, Litovio, la Balkanaj* landoj, la Kaŭkazanoj ktp... tiom da fidelaj aliancanoj de la rusa revolucio, ni vidas, ke tute la kontraŭo estiĝis. Unu post la alia, tiuj "nacioj" utiligis la freŝe akiritan liberon por fariĝi ĝismortaj malamikoj de la rusa revolucio, la aliancanoj de l' germana imperiismo, kaj la standardistoj, sub ĝia protekto, de la kontraŭrevolucio en Rusio.*

*La interludo kun Ukrainio en Brest, kiu alkondukis decidan turnon en la traktadoj kaj en la tuta interna kaj ekstera politiko de l' bolŝevikoj, estas speciale trafa ekzemplo pri tio. La sinteno de Finlando, Polio, Litovio, la Baltaj ŝtatoj, la nacioj de l' Kaŭkazo, montras al ni laŭ plej konvinka maniero, ke temas ĉi tie ne pri hazarda escepto, sed pri tipa fenomeno.*

*Evidente, en ĉiuj tiuj kazoj, reale ne la "nacioj" faris tiun reakcian politikon, sed nur la burĝa kaj etburĝa klasoj, kiuj ekiris en akran konflikton kun siaj propraj proletaj amasoj kaj utiligis "la rajton pri libera nacia memdifino" kiel ilon de sia kontraŭrevolucia klasa politiko. Ĝuste en tio - kaj ĉi tie ni alvenas tute rekte al la kerno de la demando - kuŝas la utopia, etburĝa karaktero de tiu ĉi naciista frazo : ĝi transformiĝas, en la maldolĉa realo de l' klasa socio, kaj precipe en la tempo de pleje akriĝintaj konfliktoj, en simplan rimedon de superregado por la burĝa klaso.*

***La bolŝevikoj devis lerni per siaj propraj kostoj kaj per tiuj de la revolucio, ke sub la regado de l'***

-----

* Certe preseraro anst. "Baltaj". - Trad.

# Pri la laborista esperantismo

ĉe **SAT-Broŝurservo**
(Esperanto, F 47470 Beauville)
estas disponeblaj jenaj tekstoj :

**E. LANTI. Naciismo** - Studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj. (Originalo, 76 p.). Reeidono de la fama verketo, klasikaĵo de la laborista E-movado. "La naciismo neniel estas pravigebla de la saĝo. Ni ŝatus, ke la leganto akiru tiun firman opinion ĉe la finlego de ĉi tiu studo."

**El Verkoj de E. LANTI**, en tri volumoj (168+140+120 paĝoj).

Unua volumo : **For la Neŭtralismon ! - La Laborista Esperantismo - Absolutismo - Herezulo Herezaĵo - Adamaĵoj**

Dua volumo : Tri **semajnojn en Rusio** (1922 - **Epiloge...** - Tro Plena Gramatiko

Tria volumo : Artikoloj - Paroladoj - Leteroj 1937 - 1946.

"Artikoloj riĉaj je ideoj, sed ideoj klaraj, neniam nebulaj. Tiu forta, akrefika inteligento, neniam embarasiĝas en erarigaj detaloj, ĝi rekte iras al la esenco, fulme trafas la kernon de la demando. La stilo estas ĉiam flua kaj neta."

**Vortoj de Kamarado E. LANTI** (Originalo, 192 p.)
Dua eldono. La tutan filozofion de la fondinto de SAT vi trovas en tiuj artikoloj sagacaj kaj pripensigaj pri ĉio, kio koncernas la socian vivon.

**Leteroj de E. LANTI** (Originalo, 244 p.)
En ĉi tiu libro (ariganta leterojn verkitajn ĝis 1938) troviĝas la senĝena pensesprimo de K-do Lanti pri la esperanta afero ĝenerale ; pri la skismo, kiu okazis en nia movado ; pri marksismo, bolŝevismo, judismo, moralo ktp; pri budaismo, Rabelezo, japanaj virinoj ktp. ktp. Fine, publikaj leteroj pri sennaciismo. **"Leteroj de Lanti"** apartenas al la malmultaj originalaj E-verkoj, kiujn nepre devas legi - eĉ se per kritikaj okuloj - ĉiu interesato pri la historio de la **vivanta** Esperanto. Dua eldono.

**kapitalismo ne ekzistas rajto je libera nacia memdifino ; ke en klasa socio ĉiu klaso el la nacio aspiras aliel "memdifini" kaj ke, por la burĝaj klasoj, la vidpunktoj pri la nacia libero estas entute subordigitaj al tiuj pri la klasa superregado*.**

La finlanda burĝaro, kiel la ukrainia etburĝaro, unuanime preferis la regadon de l' germanaj trupoj al la nacia libero, se ĉi-lasta devus esti ligita kun la "danĝeroj de l' bolŝevismo".

La espero transformi tiujn realajn klasrilatojn en siajn malojn, ekzemple per "plebiscitoj" (popolaj referendumoj), ĉirkaŭ kiuj ĉio turniĝis en Brest, kaj la konfido al la revolucia popol-amaso por akiri voĉdonan plimulton por la unuecigo kun la rusa revolucio signifis, se ili estis konsiderataj serioze de Lenin kaj Trocki, nekompreneblan optimismon; kaj se tie okazis nur taktika rapirobato en la duelo kun la perforto-politiko de Germanio, tio estis danĝera ludo kun la fajro.

Eĉ sen la germana milita okupado, se estus okazinta en la limlandoj la fama "plebiscito", ĉe la kamparanara spiritostato kaj tiu de larĝaj tavoloj el ankoraŭ indiferentaj proletoj, konsidere la reakcian tendencon de l' etburĝaro kaj la mil rimedojn, pri kiuj disponis la burĝaro por influi la voĉdonon, laŭ ĉia verŝajno, ĉie estus akirita rezulto malmulte ŝatata de la bolŝevikoj. Oni povas konsideri kiel absolutan leĝon, en ĉio, kio koncernas la plebiscitojn pri la nacia demando, ke la regantaj klasoj, aŭ, - kie tio ne koincidas kun iliaj vidpunktoj, - sukcesas malebligi ĝin ; aŭ - kiel la voĉdono okazis, havas en manoj ĉiujn kaj ĉiajn rimedojn por influi ĝiajn rezultojn kaj ankaŭ atingi, ke ni neniel povas enkonduki la socialismon per tiaj popolaj konsultadoj.

Ke la demando pri la naciaj aspiroj kaj apartiĝemaj tendencoj entute estis ĵetata meze en la revoluciajn batalojn, kaj eĉ starigata unualoken per la

-----

* Nia substreko. - Trad.



paco de Brest-Litovsk, ke oni faris el ĝi eĉ la plej sanktan el la sanktuloj de la socialista kaj revolucia politiko, tio portis la plej grandan konfuzon en la vicojn de l' socialistaro kaj ŝancelis la pozicion de l' proletaro precipe en la limlandoj. En Finlando la socialista proletaro havis jam regantan pozicion tiel longe kiel ĝi batalis en la densaj vicoj de l' revolucia falango de Rusio ; ĝi havis la plimulton en la parlamento, en la armeo, ĝi estis reduktinta la burĝaron al kompleta nepovo kaj ĝi estis la estro de la situacio en la lando. La rusa Ukrainio estis ĉe la komenco de l' jarcento, en tempo, kiam la manio pri "ukrainia naciismo" kun siaj Karbovencoj kaj la "Universaloj" ne ankoraŭ estis inventita, kaj kiam Lenin ne estis elpensinta fari el "sendependa Ukrainio" sian preferatan objekton, la ĉefa fortikaĵo de l' rusa revolucia movado. El tie, el Rostov, Odeso, el la Donecbaseno, la unuaj lafotorentoj de l' revolucio ekfluis (jam ĉirkaŭ la jaroj 1902-1904) kaj ekbruligis en tuta suda Rusio flamondaron, preparante tiel la erupcion de 1905 ; la sama afero ripetiĝis en la nuna revolucio, en kiu la sudrusia proletaro formis la elitotrupon de la proleta falango. Polio kaj la baltaj landoj estis de post 1905 la plej potencaj kaj plej fidelaj fokusoj de la revolucio, en kiuj la socialista proletaro ludis distingegan rolon.

Kiel okazas, ke en ĉiuj tiuj landoj subite la kontraŭrevolucio triumfas ? La naciista movado paralizis la proletaron ĝuste per tio, ke ĝi apartigis ĝin de Rusio, kaj liveris ĝin al la nacia burĝaro en la limlandoj. Anstataŭ celi, en la spirito de l' nova internacia klasa politiko, kiun ili aliparte defendis, al unuecigo plej densa de l' revoluciaj fortoj sur la tuta teritorio de l' imperio ; anstataŭ defendi per dentoj kaj ungoj la tuton de l'rusa imperio kiel revolucian teritorion, kontraŭmeti unuvorte al ĉiuj apartaj aspiroj de l' naciismo la solidaron kaj nedisigeblon de l' proletoj el ĉiuj nacioj en la influsfero de l' rusa revolucio, la bol-

*ŝevikoj liveris al ili, per la naciista frazaro voĉtondranta pri la "libera memdifina rajto ĝis la ŝtata memstariĝo" ĝuste la plej deziregitan, plej bonan pretekston, la standardon por iliaj kontraŭrevoluciaj intencoj.*

*Anstataŭ antaŭzorge averti la proletojn el la limlandoj kontraŭ ĉiu apartiĝemo, denuncante en ĝi la burĝan kaptilon, ili male konfuzis la amasojn en ĉiuj tiuj landoj per sia agitvorto, kaj ili liveris ilin al la demagogio de l' burĝaj klasoj. Per tiu ĉi postulo de l' naciismo ili mem alvenigis la disfalon de Rusio, ili preparis ĝin kaj tiel ili enmanigis la tranĉilon al la propraj malamikoj, por ke ili penetrigu ĝin en la koron de l' rusa revolucio.*

*Certe, sen la helpo de l' germana imperiismo, sen "la germanaj pafilkapoj en germanaj pugnoj", por paroli kiel la* **Nova Tempo** *de Kaŭcki, nek la Lubinskoj kaj la aliaj friponoj en Ukrainio, nek la Eriñoj kaj Manerhajmoj en Finlando, nek la baltaj baronoj estus venkintaj super la socialistaj proletaj amasoj de siaj respektivaj landoj. Sed la nacia apartigemo estis la Trojana ĉevalo, en kies flankoj la germanaj "kamaradoj", kun bajonetoj ĉe la pugno, enmarŝis en ĉiuj tiuj landoj.*

*La faktaj klasaj kontraŭecoj kaj la rilatoj de milita forto alkondukis la intervenon de Germanio. Sed la bolŝevikoj liveris la ideologion, kiu servis por maski tiun ĉi kontraŭrevolucian ekspedicion, ili firmigis la pozicion de l' burĝaro kaj malfortigis tiun de l' proletoj. La plej bona pruvo estas Ukrainio, kiu devis ludi tiel fatalan rolon en la destinoj de l' rusa revolucio. La ukraina naciismo estis en Rusio tute alia afero ol ekzemple la pola, finlanda aŭ ĉeña naciismoj : estis nur grava imitadaĉo, ludita de kelkaj dekduoj da etburĝaj intelektuloj, fantaziaĵo sen la plej etaj radikoj en la ekonomiaj, politikaj aŭ spiritaj rilatoj de la lando, sen iu historia tradicio, ĉar Ukrainio neniam formis nacion aŭ ŝtaton, kaj havas nenian alian nacian kulturon ol la poeziajn elpensaĵaĉojn de kelkaj reakciaj romantikuloj. La ukraina naciismo estis nekapabla naski politikan formiĝon, sen la baptodonaco de la "libera memdifino de l' nacioj".*

*Tiuj ĉi frazoj havas iafoje en la historio de l' klasbataloj tre realan signifon. Estas la fatala sorto de l' socialismo esti delegita, en tiu ĉi mondmilito, al la liverado de ideologiaj pretekstoj por la kontraŭrevolucia politiko. La germana socialdemokratio rapidis, ĉe la eksplodo de l' milito, ornami la germanan imperiistan rabadon per masko ideologia pruntita en la rubujo de l' marksismo : ĝi faris el tio la militon de liberigo kontraŭ la rusa carismo, sopiritan de niaj maljunaj majstroj. Estis lasite al la plej radikalaj kontraŭuloj de l' ministro-socialistoj, al la bolŝevikoj, porti akvon, siavice, al la mueliloj de l' kontraŭrevolucio, per tiu ĉi frazo pri la libera memdifino de l' nacioj - kaj liveri per tio ideologion ne nur por la sufokado de l' rusa revolucio mem, sed pli ankoraŭ, por la intencita kontraŭrevolucia likvido de l' tuta mondmilito. Ni havas ĉiujn motivojn por tre funde ekzameni, tiurilate, la politikon de l' bolŝevikoj. La "libera memdifino de l' nacioj", fiadoptita ĉe la Ligo de Nacioj kaj ligita kun la malarmado per la favoro de Ŭilzn, jen la batalkrio, sub kiu daŭrados la estonta batalo de l'internacia socialismo kontraŭ la burĝa mondo. Evidentiĝas klare, ke la frazo pri la libera memdifino kaj la tuta nacia movado, kiuj formas nuntempe la plej grandan danĝeron por la internacia socialismo, ricevis precize per la rusa revolucio kaj la Brest-Litovskaj traktadoj eksterordinaran plifortigon. Ni devos nin okupi ankoraŭ detale pri tiu ĉi starpunkto. La tragikaj destinoj de tiu ĉi frazaro en la rusa revolucio, en kies pikilaĵo la bolŝevikoj devis kaptiĝi kaj vundi sin, devas servi kiel averta ekzemplo al la internacia proletaro.*

Tradukita el "Die Russische Revolution" (**La Rusa Revolucio**), el la postlasaĵo de R.L., kiun eldonis P. Levi (1922).

Por **SAT-Broŝurservo** presis : Baudé, F 47470 Beauville